


**INTERNACIA
PEDAGOGIA REVUO**

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj



Redaktoro:

Jozefo Németh

Vicredaktoro:

Katalin Smidéliusz

Kunlaboris:

Boo Mee Kim-Lindblom

Mauro La Torre

Stefan MacGill

Franz-Georg Rössler

S. P. Smits

ENHAVO

Maŭro LA TORRE: <i>Proverbante, ... oni lernas</i>	1
<i>Memore al BARCSAY Zsuzsa (KOVÁCS Márta)</i>	15
Jean BERBAUM: <i>Lerni kaj instrui</i>	18
<i>Interkultura julio en Jugoslavio (Radojica PETROVIĆ)</i>	22
<i>El la landoj kaj sekcioj (AL, GB, CN, FI, DE, HU, CU, PL)</i>	26
<i>Por via notlibro</i>	31-32, 36
<i>Serĉata: Varba direktanto por "Juna Amiko" (smg)</i>	31
<i>ILEI-Bulteno: aperas 365-foje jare! (smg)</i>	32
<i>ILEI kontribuis ekzercoj al Pasporto (smg)</i>	32
<i>Aliĝilo por la 35-a ILEI-Konferenco en Lovran (Rijeka)</i>	33
<i>Senpaga E-kurso por anglalingvanoj</i>	36
<i>Familiaĵoj</i>	36
<i>Donacintoj por ILEI en 2000 (BM)</i>	36

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Maŭro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio.
Tel. (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673.
<m.latorre@uniroma3.it>; <http://lps.uniroma3.it>
Interlernaj projektoj, komunikiloj, terminaro, reprezentado.

Vicprezidanto: Stefan MacGill, Bethlen Gábor u. 2, HU-2030 Érd, Hungario.
Tel. (+36 23) 364 198. <stefan.macgill@galamb.net>
Lerniloj, komunikiloj, eldona agado.

Sekretario (aganta): Mariana Evlogieva, Druhba-2, PK 18, BG-1582 Sofia, Bulgario.
Tel. (359 2) 24-33-78. <intrpres@usa.net> aŭ <amuze@poboxes.com>
<http://www.poboxes.com/amuze>; <http://www.webalias.com/amuze>
Membraro, sekcioj, komitato

Vicsekretario: Jennifer Bishop, 39 Hill Street, Hawthorn, Victoria 3122, Aŭstralio. Tel. (+61 3) 9818 7358, fakso: (+61 3) 9905 3668.
<esperanto@education.monash.edu.au> *Lernejoj, konferencoj, gimnazio.*

Kasisto: Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge.
Tel. (+46 8) 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>

Membro: *La estrara loko vakas, kun respondeco pri lerneja kaj universitata agado.*

Membro: *La estrara loko vakas, kun respondeco pri instruista trejnado kaj scienca esplorado.*

Pri la kompletigo de la estraro vidu detalojn en IPR 00/3!

Maŭro La Torre Proverbante, ... oni lernas

Nin instruas eraro, kiun faras najbaro


1. Enkonduko

Ĉu proverboj ankoraŭ uzatas kaj utilas? Ĉu proverboj ankoraŭ helpas instruadon? Kion oni povas lerni el proverboj?

Proverbo estas sperto, proverbo estas averto

En la nuntempaj kulturoj la proverboj konsistigas literaturan ĝenron relative malmodan. En multaj landoj (ĉu en ĉiuj?) videble la proverbo-kono de la homoj malpliigas de generacio al generacio. Sed ankaŭ pro tio ili meritas apartan atenton, simile kiel oni emas protekti malaperriskajn bestojn kaj plantojn.

Cetere, en la transformiĝo de socioj el kampara stadio al industria kaj postindustria, ĉu la iaman lokon de proverboj ne prenas la komercaj sloganoj kaj la entreprenaj devizoj? Ĉu do la ĉiutaga refreneca ripetajo de populara televida aktoro, ĉu la devizo regule repropinata de partiestro aŭ de ideologia influulo, ĉu la slogano ŝose-rande legadata en reklam-afiŝegoj ne estas modernaj versioj de iamaj proverbecaj diraĵoj? [Sube: parto de pentraĵo de Pieter Bruegel, "Nederlandaj proverboj", 1559 – la originalo entenas pli ol 100 proverbojn.]



Se plaĉus al vi esti regalata kiel Reĝo... (Austrian Airlines, 1992)
Flugu pli proksimen al la vera Finnlando (Finnair, 1995)
Nacia lingvo en hejma rondo - Esperanto en tuta mondo
Por kulturo de paco kaj senperforto
Esperanto, la dua lingvo por ĉiu
Simpla, facila, belsona,

2. Difino

La respondoj memkompreneble dependas de tio, kion ni vere celas per la vorto **proverbo**. Klara, malimplica difino de tiu termino estas defio eĉ por plej famaj proverbistoj⁽¹⁾. Tamen ni povas provi jene listigi almenaŭ iujn ecojn plimalpli tipajn de la proverboj.

a) Proverboj estas **fiksitaj dirajoj**, kies frazeroj kutime ne estas anstataŭigeblaj per aliaj formoj. Se oni en ili ŝanĝas vorton aŭ vorteron, la rezulta frazo ĝenerale ne estas alia proverbo. Tial proverboj parencas je aliaj kliŝaj dirajoj, kiaj la sentencoj, la devizoj, la frapfrazoj, la aforismoj, la t.n. “idiomajoj”.

Libereco, egaleco, frateco
Unu homaro, unu lingvo
Negoco estas negoco (Seneko)
La praktiko, kiu instruas kaj amuzas
Poltroneco estas scii, kion mi faru, kaj ne fari tion (Konfuceo)

b) Proverboj parencas ankaŭ je la aŭtoraj citaĵoj. Fakte en la parolo oni kvazaŭ “eliras” el sia dira rolo, por mencii **aliulan** (onian) diron, iam eĉ ŝanĝante sian paroltonon, kiel oni kutimas en citaĵoj.

Onidire infanoj, frenezuloj kaj filozofoj diras la veron: Tial la infanojn oni batas, la frenezulojn oni enfermas en institutojn kaj la filozofojn oni ne komprenas. (Paganini)

c) Tamen, dum citaĵoj kaj aforismoj havas plimalpli konatan patrecon, la proverbojn oni konsideras “verkitaĵ fare de la popolo”. Memkompreneble ĉiu proverba frazo iam kaj ie devis esti naskata de iu, sed tiu **aŭtoro** estas **ne plu konata**.

La loto estas jetita (Cezaro)
Unu hirundo ne faras printempon (Aristotelo?)
Instruante, ni lernas (Seneko)
Proletoj de ĉiuj landoj, unuigŭ (Marks/Engels)
Komenco bona, laboro duona (-)

ĉ) Enhave la proverboj plej ofte esprimas veraĵojn “**ĝenerale**” akceptatajn en iu kultura komunumo. Pri tiu aspekto ili similas la sentencojn kaj la aforismojn.

Laŭ mateno oni juĝas la tagon
Du militas, tria profitas
Plibono estas malamiko de bono
Sana menso en sana korpo (Sokrato)

d) Sed dum sentencoj kaj aforismoj rekte esprimas sian signifon, la proverboj oblikve atingas sian celon per **metaforoj**. Alimaniere dirate, la situacion rekte esprimatan de la vortoj mem de la proverba frazo ni devas reinterpreti figure sur alia signif-ebeno.

<i>Ĉiun aŭdu, mem decidu</i>	rekte
<i>Neniam prokrastu ĝis morgaŭ tion,</i>	
<i>kion vi povas fari postmorgaŭ (Twain)</i>	rekte
<i>La ludo kandelon ne valoras</i>	oblikve
<i>Kiam la kato promenas, la musoj festenas</i>	oblikve

e) Figureco estas tipa de ankaŭ aliaj literaturaj ĝenroj: ni pensu ekzemple pri la fabeloj.

Cikado kaj formiko
Vulpo kaj vinberoj
Lupo kaj ŝafido

Tamen, kontraste je fabeloj, proverboj estas treege **koncizaj**. Ili konsistas maksimume el dupropozicia frazo; ofte ili estas eĉ pli mallongaj, rezignante je sintakse gravaj vortoj kiel la ĉefverbo(j).

Hundo bojas, pasanto vojas
Kia la patro, tia la filo
Tempo estas mono
Mano manon lavas
Ĉio havas finon
Al ĉiu la sia
Hunda vivo
Lupe malsati

f) Fine – sed ne malplej grave – la proverboj emas prezentiĝi per **poemeca** formo, kun ritmo kaj ofte kun rimo. Ĉi tiu eco evidente helpas plaĉon kaj parkeradon.

Belaj rakontoj el trans la montoj
Neniu estas profeto en sia urbetoj
Nuda kaj kruda, sen groŝo en poŝo
Ne prenis pastro la donon, rekaŝu sako la monon.

Aldoneblus aliaj konsideroj, precipe pri la sociklasa **popoleco** de la uzado – *Venas proverbo el popola la cerbo* – kaj pri la ofta **spriteco** de la retorika figuro; sed suspektele temas pri ecoj malpli esencaj kaj ĝeneralaj, kaj krome malpli objektivaj takseblaj.

Fliku truon dum ĝi estas eta

Se vi faros vin ŝafo, la lupoj vin manĝos

Avarulo kaj porko estas bonaj post la morto

Kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas

Kiel ni vidis, ĉiu el la supre menciitaj ecoj ne estas tipa de proverboj, sed ĝi povas aparteni je aliaj specoj de diraĵoj. Tamen la **kunaĵo** de la diritaj ecoj verŝajne **karaktizas** la specon de ni konsiderata. Alivorte, kvankam ofte oni hezitas atribui iun frazon je iu diraĵo-speco aŭ je alia, nur proverboj kontentigas samtempe ĉiujn tiujn ecojn:

- forma fikseco,
- citeco,
- senaŭtoreco,
- akcepteco,
- figureco,
- koncizeco,
- poemeco.

3. Socia kaj eduka rolo

Ĉiam la proverboj kondensigis la sciojn en formoj facile memoreblaj kaj transdoneblaj. Similan rolon ludas nun la frapfrazoj kaj sloganoj, kvankam ĉi-lastaj estas intence kaj industrie planitaj, ekspluatante ankaŭ psikosciencajn kaj sociologiajn rimedojn.

Jam ekde la antikveco sentencoj kaj proverboj estis grava parto de instruado, aŭ almenaŭ ili estis maniero por longe memori la instruojn, iel ajn ricevitajn. Iam eĉ sciencajn principojn oni lernis sentenco-forme.

Proverbo estas restaĵo de prafilozofio, konserviĝinta inter multaj ruinoj pro sia mallongeco kaj oportuneco (Aristotelo)

Via nutraĵo estos via kuracilo (Hipokrato)

Ekstremaj malbonoj, ekstremaj rimedoj (Hipokrato)

Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia (Zamenhof)

Ankoraŭ en renesancaj lernejoj oni abunde lernadis latinlingvajn tradiciajn diraĵojn. Kaj, konsiderante, ke tiam la latina ne estis la gepatra lingvo de la lernantoj, oni povas facile imagi kiel tiuj parkeraj diraĵoj vole-nevole rolis ankaŭ kiel modelaj frazoj pri la lernata lingvo⁽²⁾.

Mano pekis, dorso pagas [O AS, O AS]
Oŝta festo, malplena kesto [A O, A O]
Barbo potenca, sed kapo sensenca [O A, sed O A]
Dirite, farite [E, E]
For de l'okuloj, for de la koro
Bovidon ni atendis, infanon dio sendis
Edzigu filon kiam vi volas, edzinigu filinon kiam vi povas

Tial el la kleriga vidpunkto oni povas distingi du gravajn valorojn de proverbo-lernado:

- 1) la **eduka**, t.e. la transdonado de kulturaj tradiciaj principoj;
- 2) la **lingvoinstrua**, t.e. la alproprigo de lingvaj modeloj.

La duan valoron bone konas ankaŭ pluraj aŭtoroj de Esperantaj lernolibroj, kiuj laŭdirinde farĉis siajn lecionojn per Zamenhofaj proverboj⁽³⁾. Tiel oni povas atingi samtempe du celojn: lernigi ekzemplajn frazmodelojn kaj liveri facile memoreblajn literatur-erojn.

Aliflanke neeŭropaj legantoj povus prave kontraŭdiri, ke la Zamenhofa internacieco estas tiu tipa de la deknaŭa jarcento⁽⁴⁾, spegulita tra la lingvoj rusa, pola, germana kaj franca, kaj revestita per dignaj Esperantaj vestoj, kio nun al ni aspektas unuflanka, ne tutmonda. Kredeble, se la du Zamenhofoj replanus sian kolekton nun, komence de la tria jarmilo, ili ne limiĝus je la lingvoj kaj kulturoj ĉirkaŭ Varsovio.

Fakte nun, kiam pasis preskaŭ unu jarcento de la unua eldono (1905a) estus bela defio por niaj "tutmondemaj" verkistoj realigi ampleksigon de la Zamenhofa Proverbaro per ekzemplaj aldonaĵoj el la ceteraj kontinentoj. Ĉu komenci kompili ian Afrikan Aldonon al la Zamenhofa Esperanta Proverbaro, Azia Aldono al la Z.P., Mezorianta Proverbaro Esperantigita, ktp.

4. Interkultura komparado

Ofte okazas inter du malsamlandaj interparolantoj (*A* kaj *B*) ke la alparolanto *A* provas uzi iun sian proverbon, demandante la aŭskultanton *B*, ĉu li komprenas ĝin, ĉu li havas ion similan en sia lingvo, aŭ kiel oni esprimus la samon ĉe li. La rezultoj povas esti diversaj, laŭ la kulturoj de la du interparolantoj kaj laŭ la konsiderata proverbo.

Povas okazi ke:

1. La aŭskultanto *B* bone komprenas la proverbon, ĉar en lia lingvo oni diras "same" (t.e. en la lingvo de *B* ekzistas proverbo, kiu estas la **laŭvorta traduko** de la proverbo en la lingvo de *A*).

2. La aŭskultanto *B* ne trovas en sia lingvo proverbon, kiu estas laŭvorta traduko de la proverbo de *A*, sed post ioma cerbumo li trovas alian proverbon, kiu esprimas “la samon” per figuro iom alia (**ekivalento**).
3. La aŭskultanto *B* **ne trovas** en sia lingvo proverbon, kiu havas la saman valoron de tiu de *A*.

Verŝajne ĉiu el vi spertis similajn okazojn kaj estus interese kolekti tiajn. Eĉ bele indus aranĝi plurkulturan eksperimentan enketon pri tio.

Se ni interesigaĵas precipe pri la kulturaj diferencoj, la komparo povas okazi per iu ajn punta lingvo, ekzemple per la Internacia Lingvo.

Supozeble se la homoj *A* kaj *B* apartenas al tre proksimaj kulturoj (kiel la itala kaj la hispana, la ĉeĥa kaj la pola), ripetante la saman “eksperimenton” kun diversaj proverboj, imageble oni trovos multajn kazojn “1”, kelkajn “2” kaj malmultajn “3”. Inverse, se la kulturoj estas tre malsimilaj, kiel la franca kaj la japana, apenaŭ troviĝos kazoj je tipo “1”, kaj verŝajne eĉ ne multos la tipo “2”, dum abundos la kazoj 3-a-tipaj.

Evidentas do, ke tia komparado konsistigas sekundan grundon por malkovri la **kulturajn diferencojn** je pluraj niveloj: kion la homoj pensas pri iuj aspektoj de la vivo, per kiuj bestoj aŭ aĵoj ili simboligas la homajn (mal)virtojn kaj ecojn, kiel ili strukturigas la metaforojn, ktp.

Tial en nia diskutejo E-INS (“Esperanto-Instruado”)⁽⁵⁾ antaŭ kelkaj monatoj ekestis la ideo kunlaborigi pri tiu temo kelkajn lerneajn klasojn de Projekto Interkulturo.

La ideo estis fokusigata kaj iom priplanata okaze de la pasintjulia Internacia Seminario “Interkulturo”, kiu okazis en Ĉaĉako (Jugoslavio), inter la diverslandaj instruistoj tie partoprenantaj.

Ni vidu pri kio temas, unue esenc-resume (par. 5), kaj poste detale (par. 6).

5. La ĝeneralaj trajtoj de subprojekto PROVERBEJO

5.1 La “ludon” povas partopreni klasoj aŭ lernanto-grupoj. Ju pli da landoj partoprenos, des pli bone por la rezultoj. Kvankam la “ludo” estas elpensita por lernejoj, verŝajne allaseblas “serioz-intencaj” unuopuloj (ekzemple senklasaj instruistoj), kiuj akceptas la ludregulojn.

5.2 La praludiloj estas la diverslingvaj proverboj, sed la peranta labora lingvo estas Esperanto.

Por unuopa grupo A:

5.3 Partoprenanta klaso (aŭ grupo) komencu **kolekti** proverbojn de sia kulturo, prefere el vivaj fontoj (ekz-e de la geavoj); manke de tio oni ĉerpu el sia memoro, el skribaj verkoj, ktp.

5.4 Prefere oni ne tro diskutu pri la difino de *proverbo*, sed elektu kriteriojn (eĉ elastajn) laŭ kiu kolekti proverbojn.

5.5 Oni klopodu iel **klasigi** la kolektitajn proverbojn eĉ plurmaniere (laŭ menciadoj, laŭ celo, laŭ strukturo, ...).

5.6 Cele de komparo kun alilingvanoj, oni **laŭvorte traduku** sian proverbkolekton en la Internacian Lingvon, aldonante – se necese – laŭsencan tradukon kaj klarigojn pri fonaj konoj por kompreno.

5.7 Surbaze de taŭge elektita areto el la Esperanta Proverbaro la klaso provu trovi sialingvajn **ekivalentojn**, se ili ekzistas. Eble ili trovos plurajn, sed kun diversa proksimeco.

5.8 Por la propra proverbkolekto (tiu menciita en 5.3 - 5.7), oni provu trovi **ekivalentojn** en la Zamenhofa Proverbaro. Komprenoble por ĉiu proverbo oni menciui, ĉu la trovita ekvivalento estas laŭvorta traduko, similvorta traduko, alia metaforo, ktp.

Por duopa da klasoj A kaj B:

5.9 Ĉiu klaso ordigas en tabelon sian proverbkolekton kun originaloj, laŭvortaj tradukoj, eventualaj kulturaj klarigoj, eventualaj ekvivalentoj en Esperanta Proverbaro (aŭ alia literatura fonto).

La du klasoj **interŝanĝas** siajn tabelojn.

5.10 Ĉiu klaso laŭeble klopodas kompletigi la tabelon ricevitan de la partnera klaso, serĉante **sialingvajn ekivalentojn**, se ili iel ekzistas. La klasoj **reinterŝanĝas** la rezultojn.

5.11 Se tio interesas kaj plaĉas, kromaj “matĉoj” (5.9 - 5.10) povas esti **ludataj** per aliaj proverbkolektoj.

5.12 La tiel kompletigitaj tabeloj estas **sendataj** al la kunordiga centro (la Kvazaŭlernejo).

Por la tuta ludantaro kaj por la "publiko":

5.13 En la Kvazaŭna Lernejo *Tibor Sekelj*, kiu estas la interreta projekcio de Interkulturo-Projekto, oni konstruas apartan ejon, nomata **PROVERBEJO**.

Tie oni prezentas la ludregulojn kaj aliajn utilajn informojn, ekzemple indikojn por trovo de PROVERBAROJ paperaj kaj komputilretaj.

5.14 En la Proverbejo oni aperigas ĉiujn alvenantajn rezultojn, t.e. la kompartabelojn, kaj eventualajn aliajn materialojn.

5.15 Oni konstruas **plurlingvan datumaron**, nutrata iom post iom per la alvenantaj kompartabeloj. Pli precize temos pri datumbazo (rikordaro), en kies rikordoj (datumeroj) lokiĝos proverboj kun diverskulturaj ekvivalentoj en Esperantlingva prezento.

6. Didaktika skiza laborplano

Oni supozas ke la lernantoj almenaŭ intucie iom scias kio estas *proverbo*. Se komence ili ne bone distingas inter strikta proverbo kaj parencaj proverbecaj formoj, ne gravas, ili komprenos poste. Se ili tute ne scias, verŝajne sufiĉas montri al ili kelkajn ekzemplojn plej konatajn ...

6.1. PROVERBA KOLEKTADO

La infanoj kolektas proverbojn aŭdatajn en ilia medio. Prefera informfonto estas la geavoj, la vilaĝaj maljunuloj, izolitaj kamparanoj aŭ paŝtistoj, ktp.

Povas esti ke la informonto - en malvarma situacio - ne tuj memoras la ĝustajn diraĵojn. Tial por instigi lin/ŝin oni pretigu ian enketan skemon: "kion vi diras pri ... avaruloj, pri vetero, pri malsaĝaj kaj malprudentaj gejunuloj", ktp. ...

La infanoj skribu la aŭditajn proverbojn kaj tradiciajn diraĵojn, kaj poste kune klopodu iel ordigi kaj klasigi ilin, eventuale diskutante pri la plej oportunaj kriterioj.

Manke (aŭ malsufiĉe) de lokaj "saĝuloj", la lernantoj povas helpi sin per taŭgaj libroj: frazaroj, vortaroj, enciklopedioj, ktp.

6.2. LAŬTEMA KLASIGO

Oni disponas je listo de 20 proverboj en sia propra (aŭ bone konata) lingvo. Ofte la plej bona lingvo estas la loka (aŭ geava) dialekto. Prefere en la listoj troviĝu diroj diverstemaj kaj diversspecaj. La tasko estas klasigi la proverbojn (kaj

eventuale similajojn) laŭ temo kaj celo (ek-e: mono, sano, feliĉo, naskiĝo/morto, geedzeco, amikeco, laboro, religiemo, ktp.)

Verŝajne malkovriĝos la distingo inter supra temo (ekz-e oni parolas pri kato kaj muso), kaj esence celata temo (kion oni volas reale esprimi per tia diro: homaj virtoj, potenco-rilatoj, realo/ŝajno, agmanieroj, ktp.)

Kia la abato, tia la monaĥo

6.3. RETORIKAJ ASPEKTOJ

Iuj proverboj (ĉu pli ĝuste "sentencoj"?) esprimiĝas rekte kaj eventuale abstrakte:

Tuso kaj amo ne estas kaŝeblaj

Ŝajno trompas.

Aliaj esprimiĝas per iaj tipaj figuroj:

En put' la rano ne scias pri la oceano

Tajloro krimis, botisto pendas

Oni povas kompari la proverbajn formojn, selekti la figurajn dirojn, kaj klasigi la figur-specojn (metaforoj, analogioj,)

Tio plej bone funkcias, se oni trovas grupon da diraĵoj pri sama temo aŭ en sama temaro, kie ĉiu grupano malsamas ĝuste pro la literatura formo. Memkompreneble ĉi tiu estas agado por pli aĝaj kaj motivitaj lernantoj

6.4. LAŬVORTA TRADUKO

Ni imagu ke la klaso jam kolektis liston da proverboj plimalpli tipaj de sia kulturo, kaj intencas iel konigi ilin al samaĝuloj de alia lando kun alia lingvo. Kion fari?

Rekte traduki siajn diraĵojn en la lingvon de la aliuloj, eĉ se oni iom konas ĝin, estas malfacila tasko! Ni provu uzi la internacian lingvon Esperanto, kiel ponton, kiel pivoton.

La klasanoj tradukas ĉiun elektitan proverbon, laŭvorte en Esperanton.

Se necesas, ili aparte aldonas klarigon pri kulturaj aspektoj, ne mem-evidentaj.

Se, ekz-e, mi tradukas laŭvorte italan proverbon tiel:

Tiom da fojoj la katino iras al la lardo, ĝis kiam ĝi tie lasas sian piedeton.

Tio estas klara nur por homoj, kiuj kutimas havi hejme katojn kaj kaptilojn kun lardo, kiuj kaptas la "manon" de la lardoprenanto.

Konvenas fari tian laboron kaj pri proverboj supozeble internacie konataj, kaj pri aliaj pli loke karakterizaj, kiuj estas malfacile kompreneblaj de ali-kulturanoj. (Pensu ekzemple pri azianoj aŭ afrikanoj.)

6.5. SERĈADO DE EKVIVALENTOJ EN SIA LINGVO (de alikulturaj proverboj)

La instruisto proponu areton da esperantaj proverboj (ekz-e el la *Zamenhofa Proverbaro*), prefere pri iu difinita temo (ekz. AMIKECO/MALAMIKECO).

La lernantoj legu tiujn proverbojn, komprenu ilin laŭvorte, interpretu ilin laŭcele; se eblas, trovu ekvivalenton en sia lingvo.

Du militas - tria profitas.

Melki virkapron.

Gasto kiel fiŝo baldaŭ fariĝos malfreŝa.

Rusto manĝas feron, kaj zorgo la homon.

Se brulas nenio, fumo ne iras.

Nedeviga aldona ago: ni trovis ekvivalenton, sed kiuspeca estas la ekvivalento? (laŭvorta traduko, paralela esprimajo samcela, similcela dirajo, ktp.)

6.6. SERĈADO DE EKVIVALENTOJ EN LA CELLINGVO (por siaj proverboj)

Por proponita proverb-kolekto (eble tiu konstruita de la klasanoj mem en agado (6.1) aŭ tiu laŭvorte tradukita en (6.4)) la klasanoj serĉu internaciajn ekvivalentojn en la ESPERANTA PROVERBARO.

Tia laboro realiĝas iom diverse, laŭ la formo kaj materieco de la E-a Proverbaro, je kiu oni disponas: papera/elektrona; kiel ordigita, kun kiaj serĉ-rimedo, ktp.

6.7. KLAS-DUOPA PROVERB-INTERŜANĜO

Du diverslingvaj klasoj (A, B) pariĝis.

Ĉiu klaso el la paro agas jene.

7a. ĝi kolektas almenaŭ 10 proverbojn de sia kulturo;

7b. ĝi tradukas la proverbojn laŭvorte al Esperanto;

7c. ĝi serĉas eventualajn ekvivalentojn en la Esperanta Proverbaro;

7ĉ. se necese, ĝi aldonas kulturajn klarigojn;

7d. per la dirita materialo kompilas tabelon jenan:

N-ro	ORIGINALA PROVERBO (nacilingva formo)	LAŬVORTA TRADUKO (en Esperanto)	eventuala LAŬSENCA TRADUKO (en Esperanto)	eventuala KULTURA KLARIGO	ESPERANTA PROVERBARO (internacia ekvivalento)
1					
2					
...					
10					

7e. La du klasoj interŝanĝas la respektivajn tabelojn.

7f. Klaso A, ricevinte la proverban tabelon de B, klopodas trovi A-lingvajn ekvivalentojn por tiu B-landaj proverboj;

7g. Ĝi metas la trovitajn ekvivalentojn (laŭvorte tradukitaj Esperanten) en nova kompara tabelo:

N-ro	LAŬVORTA TRADUKO de A-proverbo	ESPERANTA PROVERBARO (internacia ekvivalento)	LAŬVORTA TRADUKO de B-proverbo
1			
2			
...			
10			

7ĝ. Fine la du klasoj reinterŝanĝas la novajn tabelojn tiel kompletigitaj;

7h. Memkompreneble ili sendas kopion al la internacia KVAZAŬLERNEJO *Tibor Sekelj*, kiu publikigas ĉiujn ricevatajn kopiojn.

6.8. MULTLINGVA KOMPARADO (multkultura)

Per la tabeloj kolektitaj el la diversaj landoj en la Kvazaŭlernejo *Tibor Sekelj* oni konstruas iom post iom grandan proverban datumaron, kiu havos la jenan aspekton (imageble en tiu tabelego restos multaj "truoj" – kaj en la ESP-a vertikalo, kaj en la etnaj vertikaloj):

N-ro	ESP	SRB	RUM	EVE	JAP	FIN	BRA	ITA	...
1									
2									
3									
...									
...									
1000									

Bela ludo estos klopodi ŝtopi kelkajn truojn. Je tia ludo ni povos inviti ankaŭ eksterajn ... beletremulojn.

6.9 LUDO

Iu mimas per gestoj proverbon, la ceteraj devas diveni. La diveninto mimos alian proverbon, ktp.

7. Referencoj kaj laborrimedoj

La ĝenerala bibliografio pri proverboj kaj diraĵoj de la diversaj kulturoj estas praktike senfina. Ĉiujare aperas centoj da novaj eseoj teoriaj kaj praktikaj⁽⁶⁾. Ĉi tie mi menciis nur iujn Esperantlingvajn materialojn; ceterajn referencojn ni povos gastigi en la reta Kvazaŭlerneja Proverbejo.

7.1 Esperantaj proverbaroj (krozeblaj TTT-paĝaroj)

- Proverbaro Esperanta (LINDSTEDT Jouko, Helsinko)
[<http://www.helsinki.fi/~jslindst/proverbaro.html>]
- Zamenhofa Proverbaro (DÜRER Holger, Bremeno)(antaŭparolo de H. Laine, 1983)
[<http://www.pc-labor.uni-bremen.de/Esperanto/prov/prov.html>]
- Proverbaro Esperanta (HIROTAKA Masaaki / YAMASAKI Motohiro, ĉe MIJOŜI Cutomu)
[<http://mylab.ike.tottori-u.ac.jp/~mijosxi/eo-/dokumentoj.html>]
- Proverbaro Esperanta (PEJNO Simono)
[http://ourworld.compuserve.com/homepages/profcon/e_prov.htm]

7.2 Esperantaj proverbaroj (dosieroj elŝuteblaj el Interreto)

- Arkivejo de Esperanto (HIROTAKA Masaaki)
[<http://www2.saganet.ne.jp/vastalto/esp/arkivo.html>]
- Historiaj Esperanto-dokumentoj (WEICHERT Martin, Virtuala Esperanto-Biblioteko)
[<http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/veb/doku.html>]
- Esperanta proverbaro (LUIN Franko, por Makintoĵuloj)
[<http://www.esperanto.se/html/espro.html>]
- Konsiloj por la kursfinintoj (JEFO)
[<http://rafale.worldnet.net/~mjb/gerda/u/konsiloj.htm>]
- Proverbaro Esperanta-Portugala (BEL, br)
[<http://www.esperanto.org.br/arquivos.htm>]
- Tekstara arkivo
[<ftp://ftp.stack.nl/pub/esperanto/esperanto-texts.dir/proverbo.txt.gz>]
- Tekstara arkivo
[<skynet.stack.nl/pub/esperanto/essperanto-textes.dir/>]

7.3 Esperantaj proverbaroj (libre eldonitaj)

- 1910, Zamenhof L.L., *Proverbaro Esperanta*, Parizo, 82 p.
- 1922 (1983), Minor, Karl, *Deutsche Redensarten in Esperanto, Germana-Esperanta esprimaro laŭ la proverbaro esperanta de d-ro L.L. Zamenhof*, Berlino 1922 (reeld. Saarbrücken 1983)
- 1961, Zamenhof L.L., *Proverbaro Esperanta*, red. Rogister C., ENK. Waringhien, Stafeto
- 1964, Zamenhof – Fernandes, *Esperanta-portugala proverbaro. Amo per proverboj*, Rio de Janeiro, 170 p.
- 1974, Zamenhof, L.L., *Proverbaro Esperanta*, Gutenberg, 2a eld., 167 p.
- 1976, Zamenhof, k.a. (laŭ), *Proverbaro*, Tesaloniko, Tamtama eld.
- 1976, Zamenhof, Ludwik Lazar, *Proverbaro*, Goteburgo
- 1980, Zamenhof, Marko, *Proverboj de Marko Zamenhof kaj de Lazaro Zamenhof*, red. Adolf Holzhaus, Goteburgo
- 1987?, Mitrović, Slobodan, *Oĉi su prozor srca - Okuloj estas fenestro de l' koro*, (100 proverboj), Ŝid?
- 1991, Bourgois, Lucien, *Proverbaro franca-esperanta - Esprimoj sankciitaj de l' uzado*, Beauville
- 1991?, Bourgois, Lucien, *Esprimaro franca-esperanta*, Beauville,
- 1992, Tvaroĵek, Eduard, *Aforismoj*, Esprima, Bratislavo
- 1995 (1996), Wiersch, Hans + Wiersch, Kerstin, *Parolturnaro germana - Esperanto (Internacie kompreneblaj tradukoj de 21 000 germanaj*

frazoj, frazeroj, sintagmoj, dirmanieroj, idiotismoj, proverboj), Leuven, Esperanto 2000, ISBN 90-71205-59-2, 414 p.

- 1999, Röntynen, Erkki, *Proverbaro – Nia Komuna Heredaĵo*, Oulu, 1999 (Pli ol 3700 proverboj el la tuta mondo kolektitaj kaj tradukitaj)
- 2000, Kalčić, Sergije, *Popolaj proverboj (el la regiono Timočka Krajina)*, Zaječaro, 2000 (enestas 657 prov.)

7.4 Eseoj en Interreto

Ĵerom Vaše, “Proverbaro de Zamenhof: vort-provizo pri korpo en komparo kun franca frazaro”

Ĵerom Vaše, “Proverbaro de Zamenhof: bestoj”

Ĵerom Vaše, “Proverbaro de Zamenhof: paralelaj frazoj” (TTT-ejo *Frazeologio kaj vortstatistiko* [<http://frazeo1.free.fr/>])

7.5 Presitaj artikoloj

Riĉigota listo da interesaj esperantlingvaj eseoj pro proverboj kaj frazeologio ekaperos en la kvazaŭlerneja Proverbejo.

Venis fino de mia latino

Rimarkoj

(1) Vidu ekz-e Taylor A., *The Proverb*, 1931, Cambridge, Mass.

(2) Interesan statistikan esploron pri proverbiaj frazstrukturoj vidu en: Ĵerom Vaše, “Proverbaro de Zamenhof: paralelaj frazoj”, en ĉi-supra bibliografio (7.4).

(3) Vidu, ekzemple:

- KOLKER Boris., *Lernolibro de la lingvo Esperanto. Baza kurso*

[<http://www.esperanto.mv.ru/Lernolibro/UTF8/index.html>]

- POPOVIĆ Bojidar + TRIFUNJAGIĆ Radmila, *Udžbenik međunarodnog jezika esperanto u 40 lekcija*, 1982, Beograd

- GBEGLO Koffi, *Prenu plu*, 1995, Beaŭville, SAT/Laŭte

- VAN DAMME Emile, *Gramatika ABC-mempraktikilo*, FEL, 1993

(4) La bazan kolekton faris Marko Fabianoviĉ Zamenhof (patro de Ludoviko Lazaro), naskita en 1837a

(5) Vidu en la Interreta paĝo je adreso [<http://ips.uniroma3.it/eins>]

(6) Vidu ekzemple la bibliografiojn aperantajn en la reta periodaĵo *De Proverbio* [<http://www.deproverbio.com/>]

La interesatoj je kunlaborado en projekto *Proverbejo* bonvolu kontakti la aŭtoron Maŭro La Torre <m.latorre@uniroma3.it>

Mi batalis la bonan batalon, mi finis la kuradon, mi gardis la fidon...

II. Timoteo 4.7.

Memore al BARCSAY ZSUZSA

*Post plurmonata, nekuracebla
malsano, la 29-an de septembro 2000,
en Budapeŝto forpasis koleginino
BARCSAY Zsuzsa.*

Ni funebras pedagogon, kiu estis pedagogo ne nur laŭprofesie, sed en la tuta personeco. Per sia tuta vivo ŝi instruis: gelernantojn, kursanojn – kaj nin, ĉirkaŭvivantojn, kunlaborantojn. Ŝi instruis al ni per propra ekzemplo, kiel labori, organizi – kaj kiel zorgi pri aliaj, kiel rimarki ke iu bezonas nian helpon, kiel havi forton por okupiĝi pri alies problemoj.

Ni ricevis ekzemplon, kiel esti forta en strebado – kaj kiel akcepti la destinon; kiel esti obstine aktiva – kaj kiel cedi al la volo de la plej Potenca.

Ŝi havis tre klarajn vivprincipojn, kaj same klarajn principojn por sia laboro. Ŝi plentempe laboris en mezlernejo (dum 30 jaroj en la sama!), instruinte komence la rusan lingvon kaj la hungaran, poste ŝi iĝis bibliotekistino. Ekde 1971 ŝi okupiĝis pri Esperanto. Ŝi edukis sian filinon denaska esperantistino.

La plej vasta kampo de ŝia enlanda agado estis la prizorgo de la lerneja instruado, la egalrajtigo de Esperanto kun la aliaj instruataj lingvoj. Ŝi sukcesis atingi, ke Esperanto restu instruebla je ĉiu nivelo, ĝiaj lernantoj havu samajn eblojn kiel la aliaj ĉe konkursoj kaj abituriĝo. Tial ŝi akceptis diversajn funkciojn en ŝtataj institutoj. Ŝi multon faris por la formado kaj perfektigo de instruistoj (metodikaj kursoj ĉe Hungara Esperanto-Asocio, helpo al pedagogiaj altlernejoj por fondi aŭ vivteni Esperanto-fakon, la iniciado kaj organizado de Pedagogiaj Tagoj en Budapeŝto). Majstra en la konceptado de programoj kaj en



la gvidado de diskutoj, la nivelon de tiuj fakunvenoj ŝi influis ankaŭ per elstare bona lingvouzo, kaj ekzemplodonaj prelegoj kaj prezentoj. Ŝia granda merito estas la kunligo de porinstruistaj kaj porlernantaj programoj, danke al kio la pedagogiaj trejnadoj proponis lingvan praktikadon kaj amikan kunestadon al niaj lernantoj, kaj al la instruistoj vivajn pedagogiajn situaciojn. Ĉiuŝtuna "lukto" estis redakti kaj sendi cirkuleron al la gekolegoj. La fama slipar-adresaro enhavis eĉ 600 adresojn en la glora tempo. Ŝi respondis la leterojn de gekolegoj, vizitis ilian lernejon, prelegis, instruis la lingvon kaj metodikon.

Ankaŭ internaciskale ŝi klopodis disvastigi la "hungaran modelon" gvidante metodikajn kursojn, iniciatinte kaj kunorganizinte Internaciajn Metodikajn Seminariojn en Meza Eŭropo. En la estraro de ILEI same ŝi eklaboris por lernantoj kaj fondis por ili la t.n. Gimnazion. La tre konscie akceptitaj taskoj do ege multis. Ŝi tion plenumis, tiom, kiom la malsano ebligis tion. Iom post iom ŝi disdonacis ilin inter ni, pluraj kunlaborantoj dum multaj jaroj. Ja ŝi havis ankaŭ la talenton labori en teamo kaj esti la estro tiel, ke oni sentu sin apude egalrajta, oni kuraĝu iniciati, kapablu labori memstare kaj respondece.

Ni funebras la fizikan, korpan malaperon de koleĝino, amikino. En la memoro ni gardas ŝiajn rideton, voĉon, movojn. Kaj ĉefe ni gardu tiun flamon, kiun ŝi heredigis al ni.

Kovács Márta



Zsuzsa Barsay-maldekstre – kun Márta Kovács dum Pedagogiaj Tagoj en 1999

Faka biografio de BARCSAY Zsuzsa

Ŝi esperantistiĝis en 1971. Ŝi finstudis Esperanton en la Esperanto fakto de Universitato ELTE, en Budapeŝto.

1975-1987. Ŝi gvidis la lernejan sektion de la Instrua Komisiono de Hungara Esperanto-Asocio (HEA).

1987-1990. Ŝi estis vicprezidanto pri instruado kaj ekzamenoj de HEA.

Ekde 1982 ŝi estis nomumita landa inspektoro de la Hungara Eduka Ministerio, ekde 1988 landa konsilanto pri metodologio de Esperanto en Landa Pedagogia Instituto. Ekde 1987 ŝi estis eksperto pri Esperanto en la fremdlingva kolegio de Landa Pedagogia Instituto. Ekde 1988 ŝi instruis metodologion de Esperanto en la ĉeestaj, malĉeestaj kaj postuniversitataj kursoj de ELTE. Dum preskaŭ dek jaroj ŝi estis sekciestro de ILEI en Hungario, ĝis 1985.

Skema vicigo de ŝiaj aktivecoj:

- ŝi zorgis pri tio, ke Esperanto estu kaj restu instruebla je ĉiu nivelo de la hungara lerneja sistemo (ekde la bazlernejo ĝis la universitato, eĉ postuniversitatgrade)
- kunlaboris en la verkado de la instruprogramoj de diversaj instruformoj
- ellaboris la postulojn kaj gvidilon por la abiturienta ekzameno, ĉiujare ŝi verkis la testfoliojn
- dum du jardekoj ŝi organizis la ĉiujarajn ŝtatajn lerneajn konkursojn por bazlernejanoj, preparis la taskojn kaj gvidilojn, membris en jurioj
- organizis internaciajn tendarojn por lernejanoj
- mem gvidis multajn lingvo-kursojn al ĉiuaĝuloj, en- kaj eksterlande
- gvidis kaj organizis la kunlaboron de gekolegoj el 8 landoj por prepari metodikan videobendon por instruantoj, prijuĝis kaj korektis plurajn eldonajojn, verkis fakajn informmaterialojn ekz. por la Kultura Komisiono de la Hungara Parlamento
- regule informis la hungarajn gekolegojn pri aktualajoj, ŝi kolektis informojn pri la instruado kaj publikigis statistikon pri ĝi
- ĉiujare ŝi kunorganizis Pedagogiajn Tagojn (ĉi-jare la 15-ajn), t.e. lingvopedagogian semajnfinojn por hungaroj, sed ofte kun internacia partoprenantaro Ŝi gvidis metodikajn seminariojn en Hungario dum pluraj jaroj, sed ankaŭ eksterlande (Finnlando, Bulgario)
- iniciatis, organizis pedagogiajn, metodikajn kunvenojn (ekzemple Internaciajn Metodikajn Seminariojn por ligi instruistojn de la tiamaj socialismaj landoj), ŝi prelegis pri diversaj fakaj temoj
- estrarano pri instruado de ILEI en 1991-92, poste estrara komisiito ĝis 1998
- iniciatis kaj organizis Gimnazion de ILEI-Konferencoj ekde 1992.

Kovács Márta

Jean Berbaum

Lerni kaj instrui

Kion oni scias pri la lernado
kaj kiel eblas helpi la lernanton por plibonigi lian lernoiron

[Prelego prezentita la 17-an de julio 2000, en franca lingvo, dum la 34-a Konferenco de ILEI, tradukita de G. Riste.]

A – Memorigo de rezultoj rilate la lernadon

1 – Mensaj reprezentadoj kiel koncesprimo.

Nia ĉeesto en la mondo esprimiĝas per la mensaj reprezentadoj, kiujn ni faras pri ĝi. Ekde nia naskiĝo (kaj eĉ jam antaŭe), ni ellaboras iom-post-iome, precipe per nekonscia maniero, reprezentadojn (bildojn) pri nia ĉirkaŭaĵo. Nia agado, konscia aŭ refleksa, dependas de tiuj reprezentadoj aŭ modeloj de la realeco.

Lerni signifas evoligi nian reprezentadon de la mondo ekde informoj, kiujn ni ricevis de antaŭaj bazoj, kiujn ni nun posedas, t. e. ekde reprezentadoj, kiujn ni jam ellaboris. Lerni korespondas al agado por transformi reprezentadojn. Oni komprenas, ke en tiuj kondiĉoj, lernado povas esti nur rezulto de la aktivado de la lernanto mem, t. e. de lia implikiĝo en situacion de informado aŭ aktivado, al kiu li frontiĝas.

2 – Malsamaj formoj de reprezentado.

La konstruitaj reprezentadoj povas esti pli malpli trafaj, t. e. permesi aŭ ne novan postan akiradon. Oni povas paroli pri reprezentadoj nur “kopiantaj” aŭ reprezentadoj “produktantaj” (kreantaj). (Ekz. en lernado de lingvo kopianta reprezentado: tipa frazo permesas nur ripeti donitan frazon, dum produktanta reprezentado – forme de sintaksaj elementoj – permesas konstrui novajn frazojn). Mensaj reprezentadoj povas havi vidan naturon (oni revidas “en sia kapo” la bildon de la realeco) aŭ aŭdan (oni reaŭdas “en sia kapo” la informojn, kiuj priskribas realecon) aŭ enteni kune viditajn elementojn kaj aŭditajn elementojn. Tiam oni parolas pri miksoj reprezentadoj.

Aliflanke la reprezentadoj povas enteni informojn nur mensecajn aŭ ankaŭ afektajn kaj konduktajn. La naturo de la reprezentadoj ellaborataj fare de la lernanto parte dependas de la ricevitaj informoj (de la partoprenata instruo), sed ankaŭ de la konstruaktivo de la reprezentadoj fare de la lernanto mem. Tiel, tiu konstruado povas, sur menseca nivelo, konsideri nur la faktojn – aŭ kune – la rilatojn kaj la sencon.

3 – La diversaj mensaj aktivadoj de reprezentadkonstruo

Konstruo de reprezentado uzas la tuton de la persono, t. e. ties dimensiojn mensecajn, afektajn kaj konduktajn, sed ankaŭ la fizikan kaj psikologian staton. Oni povas diri, ke tiuj aktivadoj korespondas al plenumo de funkcioj. Ni kunigas ĉi tie la funkciojn, kiujn la multaj observoj, de ni faritaj, kaj la atestoj de ni kolektitaj, fine kondukis nin ilin konsideri. La konsideritaj funkcioj por malimplici la implicadon de la lernanto sur la menseca nivelo estas jenaj:

- la akiro de la donitaĵoj – temas pri aŭskulti, legi kaj elekti la informojn;
- la kompreno – ĝi estas la mensa rekonstruo de la akiritaj donitaĵoj, kio korespondas al konstruo de la reprezentado, pri kiu jam temis supre;
- la memorigo – ĝi korespondas al “integrado” de la ellaborita mensa bildo kaj al la ebleco de ties elvokado.

La konsideritaj funkcioj, kiuj esprimas la implicadon – la nesentinteresiĝon de la lernanto sur la afekta nivelo – korespondas al disvolviĝo de sintenoj rilate al la elementoj de la lernosituacio vastsence (lernanta sistemo): por ke estu lerno, necesas, ke la lernanto disvolvu sintenon favoran rilate al si mem (memfido, fido pri sia sukceskapablo aŭ pozitiva bildo de si mem), pozitivan sintenon rilate al la aliaj kaj al la instruanto, al la lernado, memŝanĝiĝo kaj al la lernoobjektoj. Tiuj sintenoj dependas de la valorosistemo de la lernanto, de liaj elektoj. Ili esprimiĝas per la motivado.

La funkcioj konsideritaj por malimplici la implicadon sur la konduta nivelo estas ĉi tie jenaj:

- elekto de lernoceloj – ĝi korespondas al malimplicado de la serĉata nova scio, de nova konduto, kiun la lernanto volas akiri;
- elekto de lernosituacioj – ili estas la situacioj, tra kiuj la lernanto taksas povi atingi siajn celojn (legi, aŭskulti, observi, ...);
- distanco-preno aŭ lernoregulado per taksado de la akiritaj rezultoj, de la adoptitaj lernokondutoj.

Sur la fizika nivelo la konsiderita funkcio korespondas al konservado de kontentiga fizika kaj mensa freŝeco.

Tial ni alvenas al la privilegio de la ok precipaj funkcioj por malimplicadi tion, kio estas la konstruaktivoj de reprezentado, t. e. la aktivadoj intervenantaj en lerno: akiro de la donitaĵoj, kompreno, memorigo, disvolviĝo de sintenoj, elekto de celoj, elekto de situacioj, distanco-preno, konservado de fizika kaj mensa freŝeco.

4 – Plibonigo de la propra lernomaniero.

Ĝi pasas tra plibonigo de la reprezentado (pasado de kopianta reprezentado al produktanta); diversigo de la reprezentado (ne nur vida, sed ankaŭ aŭda aŭ miksa); pliriĉigo de la reprezentado (konsidero de la mencia dimensio, sed ankaŭ afekta kaj konduta). Oni povas paroli pri serĉado de efika reprezentado, de trafa modelo de realeco. Tiu plibonigo necesigas ekkonscion pri la propra lernomaniero, t. e. ekkonscio pri la propra maniero uzi la funkciojn, kiuj supozeble sukcesas al la lernado. Tio verŝajne estas malimplico pri propra lernomaniero, do akiro de necesaj observiloj kaj priskibiloj.

B – Konsekvencoj por instruado. Kiel oni povas konkrete kontribui al plibonigo de la lernomaniero de la lernanto?

1 – Vidpunkto pri instruado.

Se lernado estas konstrui reprezentadon, helpi al pli bona lerno – tio ja estas “instrui” – ĝi korespondas al helpo por pli bone konstrui reprezentadon, t. e. konstrui pli trafan reprezentadon. Tio ĉefe estas farata per pli konscia ellaboro de la reprezentado, per ekkonscio de la propra lernomaniero.

Plibonigi la trafekon de la reprezentado estas farata ĉefe per informoj, kiujn alportas la instruanto. La celo de lia raporto estas permesi al la reprezentado fariĝi produktanta kaj ne kopianta, esti pli diversigita kaj pli riĉa (vidu A. 4. supre). Sed tio povas efektiviĝi nur, se la lernanto estas helpata por konstrui reprezentadon per pli konscia maniero. Tio implicas, ke la instruanto konsideras en sia raporto la funkciojn, kiujn implikas la konstruo de reprezentado (vidu A. 3.). Do, necesas alporti, tra la instruplano, krom informoj pri la enhavo, informon, kiu konsideras, kaj kiu malimplicas la serĉitajn celojn, kiu enkalkulas la antaŭajn konojn de la lernanto, kiuj faciligas komprenon kaj memorigon. Tiu informo devas same enkalkuli la privilegiitajn situaciojn de la lernanto (aŭ aktivadformojn, kiujn li preferas), la korespondantajn interesojn kaj kondutojn. Ĝi devas ebligi la distanco-prenon kaj permesi bonan fizikan kaj mensan freŝecon. Tiel vivigi la funkciojn, kiuj la lernadon konsistigas unuetape al helpo por ekkonscio pri kio oni povas lerni.

Dua etapo de tiu ekkonsciigo estas malimplicado de tiuj funkcioj, ĉiam enkadre de la raporto de la instruanto, rilate kun la ekstraktita enhavo aŭ lernoobjekto. Oni povas tiucele same enkonduki momentojn de malimplicado en formo de grupdiskuto pri temoj, kiuj malkovras, kio estas lerni (ekz: Kio estas la lernocelo? Kiel memoriĝi?). Tiuj samaj momentoj povas okazigi ekpraktikon de la funkcio, (tria etapo), kies naturon kaj eblajn formojn oni malkovris, enkadre de aparta lernado.

2 – Konkretaj helpoj por la instruanto kaj la lernanto.

Por konkrete helpi instruantojn, por realigi tiujn etapojn, ni proponis (en la verko “Développer la capacité d’apprendre” – Disvolvi la lernokapablon – Eld. E.S.F.) temaron ekstrakteblan kun lernantoj, por ke ili malkovru, kio estas lerno (vidu la lernofunkciojn). Por ĉiu el tiuj temoj oni sugestas aktivadformojn, kiuj kompreneble dependas de la aĝo kaj de la nivelo de la lernantoj.

Por permesi al liceanoj, studentoj aŭ formadigantaj adoltoj malkovri por si mem tion, kio estas la lernofunkcioj, ni verkis libron, kiu kondukas ilin al analizo de la propra lernomaniero tra ekzercoj kaj observoj (“Pour mieux apprendre” – Por pli bone lerni. – Eld. E.S.F.). Favore al lernantoj de mezlernejoj, kunlabore kun Bernard Wloch, mezlerneja instruisto, ni kunigis, en aktivadkajero, ekzercojn kaj orientadojn por plibonigi ilian lernomanieron (“Je sais mieux comment apprendre” – Mi scias pli bone kiel lerni – Eld. De Boeck).

Favore al diversnivelaĵaj lernantoj aŭ adoltoj, kiuj deziras dediĉi multe da tempo al pripensado pri funkcioj, kiuj gvidas al la lerno, ni efektivigis sintezon de tio, kio ŝajnas al ni scienda por transpaŝi la malfacilaĵojn renkontatajn, kiam oni volas lerni. Al ĉiu el la ok funkcioj el kiuj ni reduktis la lernon (vidu la lastan alineon de A. 3), ni korespondigis kvar proponojn, kiuj permesas prilabori tiujn funkciojn. La 32 propozicioj tiel akiritaj estas konscie prezentitaj sur 32 slipoj, kiuj ebligas analizi la lernomanieron kaj bonigadon de la praktiko. Tiu sliparo povas esti uzata antaŭ, dum aŭ post la lernado. Uznotico, kiu ĝin akompanas, sugestas formojn de kolektiva aŭ individua uzado. (Disvendado de la sliparo: *AGONE Conseil et formation – 43, rue Volney, FR-49000 Angers*).

C – Celeco de pripensado pri lerno

Konklude, oni povas emfazi la fakton, ke pripensado pri lerno, enkondukita favore al la lernantoj enkadre mem de instruado kaj rilate kun la ekstraktita lern-enhavo, kondukas ilin senti sin respondecaj pri sia lerno, sed samtempe donas al ili konkretajn rimedojn por plenumi tiun respondecon. Al ni ŝajnas necese, tiucele kunigi en ĉiu instruado la akiron rilatan al la enhavo kun aldono pri lernovoĵiro, t. e. rilate al la maniero konstrui efikan reprezentadon de la ekstraktita enhavo.

Biografia noto de la aŭtoro

Jean Berbaum (FR-24600 La Clastre) estas nun “emeritus”-a profesoro de Eduksciencoj ĉe la Universitato de Sociaj Sciencoj en Grenoble; estinte UNESKO-eksperto por starigi Superan Porinstruistan Lernejon kaj Instituton de Pedagogia Serĉfako en Abidjan (Ebura Bordo) de 1962 ĝis 1971, li instruis eduksciencojn en la universitatoj de Nancy ĝis 1983, kaj de Grenoble ĝis 1993. Liaj laboroj kaj publikajoj temas pri lerno kaj instruado.

Interkultura julio en Jugoslavio

kun impresoj de eksterlandaj gastoj

La projekto Interkulturo, krom sia ĉefflua programo, inspiris plurajn aliajn agadojn kiuj levas la prestiĝon de la internacia lingvo ekster la Esperanto-komunumo. Tiaj estis ankaŭ du aranĝoj sub la nomo de Interkulturo okazintaj lastjulie en Jugoslavio.

Internacia Esperanto-Lernejo "Interkulturo", Kopaonik 2000.07.01-09, organizita kun la ĉefcelo subteni kaj plivastigi la projekton Interkulturo, realiĝis kiel unu el 50 projektoj de 30 junularaj organizoj en la kadro de "Someraĵoj de sociaj junularaj organizoj 2000" de la Ministerio por Junularo kaj Sporto de Respubliko Serbio. En kursoj A (*Tendaraj tagoj I*) kaj B (*Tendaraj tagoj II*) partoprenis 3 instruantoj kaj 32 kursanoj el Serbio (Jugoslavio), Rumanio, Makedonio kaj Respubliko Srpska (Bosnio kaj Hercegovino). Kroma programo konsistis el sportaj kaj kvizaj konkuroj, retvizitoj al Kvazaŭlernejo "Tibor Sekelj" kun provoj kontakti malĉeestajn interkulturanojn, redaktado de murgazeto kaj lerneja bulteno, ekskursoj, tendarfajro. En la lastaj du tagoj la lernejon vizitis Maŭro La Torre, prezidanto de ILEI, kaj Boriša Miliĉević, direktoro de Esperanto-Instituto Beograd, kiuj interalie partoprenis en la ekzamenkomisionoj. Reprezentantoj de gejunulaj E-organizoj el kvar balkanaj landoj en la lernejo okazigis ankaŭ unutagan Balkanan Junularan Konferencon (BaJK) kiu ĉiujare okazas en alia balkana lando.

Internacia Seminario Interkulturo kun Somera Esperanto-Lernejo, Ĉaĉak 2000.07.09-14, estis dediĉita unuavice al klasanoj kaj instruantoj en jam ekzistantaj klasoj en la projekto Interkulturo, sed ankaŭ al ĉiuj aliaj kiuj interesiĝas pri interkultura aplikado de Esperanto. Kun gastoj el Italio, Rumanio, Bulgario kaj Respubliko Srpska de BkII, ĝi havis internacian kaj interkulturan etoson. Pro varia kaj abunda seminaria programo la ĉeestantaj instruistoj ne povis tutan sian tempon dediĉi al la paralele okazanta somera esperanto-lernejo. Tiel novaj junaj instruistoj ekhavis ŝancon, uzis ĝin kaj renkontigis sep novajn esperantistojn el Rumanio kaj Bulgario kun la spirito de esperanto kaj esperantismo.

La seminaria programo ampleksis plurajn temojn:

- Interkulturo - rezultoj kaj perspektivoj
- Renkonto kun poeto Ranko Simović - porinfana poezio en lingvo-instruado
- La vojaĝoj inter kulturoj: Tibor Sekelj
- Proverboj: eduka kaj interkultura graveco de proverboj
- Esperantaj pupteatro, filmoj kaj muziko
- Naciaj kulturoj de la partoprenantoj.

Maŭro La Torre prezentis KD-an version de la paĝaro de Kvazaŭlernejo "Tibor Sekelj" kaj faris enkondukan prelegon pri la celoj, ĝisnuna realigo kaj plujaj planoj de la projekto. La ĉeestantaj instruantoj prezentis agadon de siaj klasoj. Surbaze de tiuj komunikoj, konsiderante la bildon kiun donas la paĝaro "Tibor Sekelj" kaj aliajn informojn kiuj koncernas la projekton, oni povas ĝenerale konkludi, ke la projekto en iuj aspektoj disvastiĝis super la unue projektitaj celoj kaj, aliflanke, ke ĝi lamas en kelkaj konkretaj realigoj. Ĝi meritas plenan subtenon kaj bezonas novajn plenumantojn, materian subtenon kaj novan planon por plua realigado kaj daŭrigo post la unue projektita dujara periodo.

Dum la renkonto kun poeto Ranko Simović estis prezentita lia eĉdonpreta porinfana poemkolekto "*Fojan Tagon*" (serbe "Jednoga dana") esperantigita de Radojica Petrović. Kun sperto de aŭtoro de pluraj lerno- kaj legolibroj pri la serba lingvo, Ranko Simović dum la renkonto kun seminarianoj prelegis pri utiligado de porinfana poezio por solvi fonetikajn problemojn ĉe la infanoj kaj por pli facila alproprigado de gramatikaj nocioj kaj strukturoj. Aparte interesaj estis liaj spertoj pri utiligado de lia poezio ĉe diasporaj serboj por lernigi la gepatran lingvon al infanoj en fremdlingva kaj fremdkultura medio. Liaj esperantigitaj versajoj montriĝas aplikeblaj en instruado de esperanto - ekzemple "*Demandaj frazoj antaŭ pluvo*" amuze lernigas kolerativajn demandovortojn. Dume, la "*Sunelira virkoko*" estas siaspeca metaforo de interkultura tutglobismo. La seminario kompreneble dediĉis apartan tempon al Tibor Sekelj, kies nomon la projekto alprenis por sia reta komunikejo omaĝante tiel lian senlacan studadon kaj proksimigadon de civilize kaj geografie malproksimaj kulturoj. Enkonduke prelegis Ljubomir Trifonĉovski pri biografio de Sekelj kaj liaj ligoj kun "*Literatura Foiro*". Boriša Miliĉević prezentis bibliografion de originala kaj tradukita verkaro de Tibor Sekelj.

Dum la vespero dediĉita al esperanta kulturo Ljubomir Trifonĉovski prelegis pri pupteatro ĝenerale kaj aparte pri esperanta pupteatro. Dum liberaj horoj la seminarianoj povis spekti kvar esperantajn video-filmojn kaj aŭskulti esperantistajn muzikgrupojn.

La tempon antaŭviditan por prezentado de naciaj kulturoj plenigis du prelegoj, du ekskursoj kaj vesperoj en kafejo aŭ diskmuzika dancejo. Florica Popa prelegis pri la rumana poeto Eminescu kaj Jadranka Mirić prezentis agadon de la klasoj de Interkulturo en Zajeĉar (orienta Serbio) kaj kulturhistoriajn trajtojn de tiu regiono.

Posttagmeza promeno tra Ĉaĉak kaj vizito al ĝiaj muzeoj kaj galerioj konigis al la gastoj la kulturon kaj historiajn trajtojn de ĉi tiu urbo, ekde la ŝtonepokaj elfosadoj ĝis la aktuala vivo kun videblaj spuroj kaj influoj de diversaj civilizoj kaj kulturoj, inkluzive la restaĵojn de la pasintjara aerataka detruado de Jugoslavio. La promeno finiĝis en kafejo kun tradicia muziko aŭ, por aliaj ŝatoj, en diskmuzika dancejo.

Tuttaga ekskurso gvidis buse, piede kaj flose al la 985 metrojn alta montopinto de Ovčar kaj al kvar el dek mezepokaj monakejoj en la tiel nomata Serba sankta montaro ambaŭborde de la rivero Zapadna Morava (Okcidenta Moravo) en la Ovčar-Kablara interkrutejo, kiuj estis gardejoj kaj mem fontoj de la serba kulturo dum certa periodo de la turka regado kaj aŭstro-turka militado sur la teritorio de Serbio.

Proverboj estas aparta temo en la rubriko "Lingvo" de la planitaj interkulturaj esploroj en Kvazaŭlernejo "Tibor Sekelj", el kiu jam kreskas aparta subprojekto nomata Proverbejo, dediĉita al interkultura kaj eduka valoro de la proverboj. Tiutema diskuto komenciĝis en la retaj diskutejoj E-INS kaj SEKELJ-INS kaj altiris atenton de pluraj listanoj. En la seminario en Ĉaĉak ĉi tiu temo havis tri enkondukajn prelegojn. Radovan Marinković, ĵurnalisto kaj verkisto el Ĉaĉak, neesperantisto sed subtenanto de esperanto, ilustris interkulturecon de la popolaj saĝo kaj spirito per kelkaj ekzemploj de lokaj kutimoj kaj tradiciaj ritoj troveblaj ankaŭ ĉe aliaj slavaj kaj neslavaj popoloj, iuj eĉ en Sudano. Boriša Milićević prezentis klasifikon de proverboj en kvar specojn kaj analizis uzadon de esperantigitaj proverboj en lernolibroj de Esperanto kaj aliaj esperantaj libroj eldonitaj en Jugoslavio.

Maŭro La Torre eksplikis planatan funkciadon de Proverbejo. Ĝi estas aplikebla ĉe la klasoj de Interkulturo kiuj elektis aŭ elektos ĉi tiun esplortemon. Esperanto kaj la zamenhofa E-proverbaro havos pivotan rolon por proverbaj ekvivalentoj el diversaj lingvoj kaj kulturoj.

La seminarioj en Kopaonik kaj Ĉaĉak havis atentindan median reĉhon. Krom la financa subteno por ambaŭ flanke de Ministerio pri Junularo kaj Sporto de Respubliko Serbio, la E-renkontiĝo en Ĉaĉak aparte altiris organizan kaj materian helpon de la Urba Biblioteko, Domo de Kulturo kaj Turisma Organizo de Ĉaĉak. La tutan aranĝon, ĉiun ĝian programeron, sekvis tri lokaj televido, semajna gazeto kaj du radiostacioj, per ĉiutagaj informoj, intervjuoj kun la partoprenantoj, ĝis duonhora televida kaj kvaronpaĝa gazeta raportoj. Kelkajn tagojn poste ankaŭ la centra televido de Serbio fariĝis triminutan intervjuon kun junaj partoprenintoj de la renkontiĝoj en Kopaonik kaj Ĉaĉak.

Impresoj de eksterlandaj gastoj en Kopaonik

Cristian, 23-jara studento el Timișoaro, Rumanio:

En Jugoslavio mi estas la unuan fojon kaj ĝis nun mi havas nur belajn impresojn. Al mi pleje plaĉas la naturo kaj la homoj. Esperanton mi lernas ekde unu jaro kaj ses monatoj. Mi opinias ke ĉi tie la kurso B estas tre bona. Post Kopaonik mi iros al Ĉaĉak, kaj mi tre ĝojas, ĉar mi ekkonos ankaŭ tiun urbon.

Sebastian, 24-jara studento el Timișoaro, Rumanio:

Esperanton mi lernas jam ekde kvar jaroj. Mi eklernis ĝin ĉar mi estis vojaĝonta en Hungarujon kaj mi ne sciis la hungaran kaj dum la mallonga tempo, kiun mi havis, mi povis plej facile kaj plej rapide lerni ĝin kiel internacian lingvon. Mi estas vegeterano, mi tre ŝatas la naturon kaj bestojn. "Interkulturo" plaĉas al mi ĉar ebligas bele ellerni Esperanton, interkonatiĝi kun diversaj homoj kaj ekkonili kulturon. Nun mi estas unuafoje en Jugoslavio, ĝi estas tre interesa lando.

Ovidiu, 21-jara studento pri ekologio:

La unuan fojon mi estas en Jugoslavio. Mi ne timis veni en Jugoslavion, kontraŭe – mi senpacience atendis la alvenon. En Kopaonik al mi pleje plaĉas la interamikiĝo. Ĉi tiu estas mia unua renkontiĝo kun Esperanto kaj mi eklernis ĝin ĉar mi ŝatas lingvojn. En la Esperanto-lernejo al mi pleje plaĉas la maniero, kiel la instruantoj instruas. Ankaŭ la kursanoj estas tre kamarademaj. Ankaŭ la amuza programo post la lecionoj estas interesa. La hieraŭaj tradiciaj sportludoj tre plaĉis al mi ĉar estis juste ludataj.

Branka, 17-jara gimnaziano el Respubliko Serba (Bosnio kaj Hercegovino):

Ĉi tio ne estas mia unua vizito al Serbio (Jugoslavio). Esperanton mi lernas ekde unu jaro. La instruado ĉi tie plaĉas al mi ĉar la programo bone realiĝas. Plaĉas al mi la instrumentado kaj la amikiĝo. Pasintjare mi estis en simila lernejo en Teslić, poste en esperantista renkontiĝo en Pale, kie mi vivas, poste ankaŭ en Ĉaĉak komence de la jaro. Mi ne povas decidi kiu el la renkontiĝoj estas la plej bona.

Nevena, 17-jara gimnaziano el Respubliko Serba (Bosnio kaj Hercegovino):

Esperanton mi eklernis antaŭ unu jaro. Mi opinias ke la studprogramo ĉi tie estas bona, ĉio estas bona krom la nutrado. En ĉi-speca Esperanto-lernejo mi partoprenis pasintjare en Teslić kaj mi partoprenis en esperantistaj renkontiĝoj en Pale kaj Ĉaĉak antaŭ kelkaj monatoj.

Snejana, 28-jara diplomito pri la makedona beletro kaj studentino de la itala lingvo:

Mi venas el Skopje, Makedonio. Mi oficas en la Infana Ambasadego "Medjaši". Esperanton mi lernas jam ekde du jaroj. La unuan fojon mi partoprenas en simila aranĝo. Ekde la jaro 1991 ĝis nun mi ne estis en Jugoslavio kaj tial mi senpacience atendis ĉi tiun renkontiĝon, kiu tre plaĉas al mi. La amikaro estas agrabla. Ankaŭ la lecionoj estas plaĉaj, mi estas kontenta pri la programo.

Kun la eksterlandaj gastoj plurlingve interparolis redakcianoj de la somerlerneja bulteno: Marija Kiš, Valentina Djordjević, Zlatko Djordjević, Verica Vuksanović.

Radojica Petrović, <radp@ptt.yu>

Albanio**Zef Luigj Mjeda (1921-2000)**

La 5-an de oktobro forpasis Zef Luigj Mjeda, eminenta esperantisto de Albanio, Honora membro de UEA. S-ro Zef – pro grava malsano – ekde kelkaj jaroj jam kuŝis enlite.

Li naskiĝis kaj vivis en urbo Shkoder. Post la finiĝo de la studoj en franciskana liceo, Zef komencis instruistan laboron, sed la tiama ateista reĝimo devigis lin labori kiel lignajisto. Li ekamis Esperanton en 1958 danke al la tiama Vjetnama ambasadoro en Albanio. Zef komencis grandan laboron, kompilante grandan Albana-Itala-Esperantan vortaron kun 45mil vortoj, kaj li tradukis Esperanten plurajn albanajn literaturajojn. 20 jaroj da senlaca laboro inter malfacilaj laborkondiĉoj rezultigis aron da manuskriptoj, kiuj – pro manko de mono – tamen restis en tirkesto. En 1993, en 1000 ekzempleroj, tamen aperis lernolibro de li, kun duvoja vortaro. Ĝi ne plu estas aĉetebla en vendejoj.

Zef klopodis instrui Esperanton unue al la familianoj, poste al gelernantoj kaj fine, pere de Radio Shkodra. La nova reĝimo honorigis lin per la alta titolo „Popola Instruisto”. Lia forpaso malĝojigis ankaŭ liajn eksterlandajn amikojn. Per lia morto la albana ILEI-sekcio kaj AEL perdis unu el la pioniraj membroj.

*Bardhyl Selimi***Britio****Rubena ceremonio**

En Barlaston, Britio, festis en aŭgusto pli ol 30 esperantistoj 40 jarojn da Esperanto-somerlernejoj. Dum jubilea semajnfino, okazinta tuj post la kutima somerlernejo, esperantistoj el ses nacioj, kvin lingvo-grupoj kaj du kontinentoj aŭskultis prelegaron pri Esperanto-socio, -movado kaj -kulturo.

Prelegis i.a. Marjorie Boulton (Historio de Barlaston-aj somerlernejoj) kaj John Wells (Esperanto kaj interreto). Kaj Boulton kaj Wells instruis dum la unua staĝo en 1960; Boulton respondecis entute pri 25 el la 40 somerlernejoj.

Krome prelegis Renato Corsetti (La Esperanto-movado antaŭ la tria jarmilo: Eŭropo kaj Maleŭropo), Tim Carr ('Tra la ŝtormo' de Kalocsay), Paul Gubbins (Tradukarto kaj teatro), Anna Löwenstein (Genezo de 'La Ŝtona Urbo'), Eric McCanlis (Montagu Christie Butler: 65 jaroj por Esperanto) kaj William Simcock (Horace Barks: Profilo de aktivulo).

Laŭ la organizinto kaj de la somerlernejo kaj de la jubilea semajnfino, Paul Gubbins: 'Mi celis altgradan prelegaron kaj mi atingis altgradan prelegaron. Ne nur mi sed ankaŭ kredeble ĉiu partopreninto ege kontentis. Nun ni antaŭguas pliajn 40 same instigajn, same riĉajn somerlernejojn en Barlaston.'

*Paul Gubbins, <PGubbins@compuserve.com>**[fonto: ret-info]***Ĉinio****Esperanto-instruado en Shandong-Universitato**

Ĉi-semestre jam la 31-an fojon ekfunkciis E-kurso en Shandong-Universitato, kie Liu Xiaojun ekde la jaro 1982 instruas nian lingvon. La kurso daŭras dum unu semestro, du horojn semajne. Ĉi-semestre pli ol dudek gestudentoj lernas en la kurso. Komence s-ro Liu prezentis la historion de Esperanto kaj la vivon de D-ro Zamenhof. Li ankŭ ĉinigis la libron <ESPERANTO> verkitan de sinjoro Pierre JANTON, fama esperantisto franca, kaj donis tiun libron al la gestudentoj, do ili sentis ke Esperanto estas vere tre utila por la komunikado inter diversnaciaj homoj. Instruisto Liu faris multajn komparojn inter Esperanto kaj la angla lingvo kaj montris al la gestudentoj, ke Esperanto havas multajn avantaĝojn por fariĝi interkomunikilo en la mondo.

Dum la instruado, s-ro Liu faris eksperimentojn por ke la gestudentoj ekposedu plej eble rapide nian lingvon. Li uzas la Cseh-metodon kaj post malmulte da tempo la gekursanoj sukcesis ekparoli en Esperanto. Kelkaj studentoj volis korespondi kun esperantistoj de aliaj landoj. S-ro Liu donis al ili kelkajn adresojn el la Jarlibro de UEA. Ili skribis al kelkaj landoj, ekzemple al Hispanio, Japanio kaj ili vere ricevis respondojn. Tio multe interesigis aliajn studentojn. Multaj el la studentoj lernis la anglan lingvon dum pli ol dek jaroj, sed tre malmultaj povas uzi la anglan lingvon por korespondado. Ili eĉ ne trovas tiajn eblecojn. Sed Esperanto povas helpi ilin trovi amikojn en la mondo, ĉar esperantistoj estas ĝenerale fervoraj, ili volas korespondi kun junaj komencantoj de Esperanto. Tial kiam iu inter ni ricevis leteron de alilandaj esperantistoj, ni sentis kune la ĝojon kaj volis informi pri tio la aliulojn.

Propagandi E-on, precipe prezenti la konkretajn ekzemplojn povas konvinki tiujn, kiuj dubas pri la utileco de Esperanto. Tial mi volas, ke ni, instruistoj de Esperanto pli ofte prezentu la konkretan uzadon de Esperanto. Nur tiel, nia E-instruado povos ricevi pli kaj pli grandajn sukcesojn, ĉu ne? *Xiaojun*

Finlando**La unuafoja tutmonda fabelkonkurso**

Venis 25 verkajetoj el 8 landoj. Unuj estis originale verkitaj, aliaj tradukitaj helpe de plenkreskuloj. Kelkaj estis en preskaŭ perfekta Esperanto, aliaj en relative modesta lingvo, sed ĉiuj estis ĝojigaj kaj bonvenaj. Dankinde estas, ke UEA liveris libropremiojn kaj la aviadfirmao FINNAIR flugigis unu premiiton kun instruistino al la premiofesto en Taivalkoski, nordfinlanda komunumo. Ĉar samtempe estis disdonitaj la premioj de la tre populara finnlingva fabelkonkurso jam tradicia, la festo fariĝis impona kaj vekis atenton en la landa gazetaro. La iniciato organizi la konkurson pruvigis daŭriginda. La unuaj premioj de la 3 aĝogrupoj: Hajnal MacGill, franca infangrupo el Chateauroux, Iitu Leinonen el Finnlando. Partoprenigu viajn lernantojn en 2001. Vd. www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti

Raita Pyhälä, raitapy@jymy.kase.fi

Germanio

Porinstruistaj seminarioj en Germanio

En Germanio ekis ĉi-jare la organizado de porinstruistaj seminarioj kunlaboro kun IEI. Tiuj seminarioj estas diversstipaj kaj prilaboras diversajn temojn, kiuj rilatas al la instruado. Pentekoste okazis la unua aranĝo, ĝi estis Cseli-seminario A. Dum la dua okazis prelegoj pri gramatiko, interlingvistiko, perceptado kaj Esperanto-literaturo de la unua periodo.

Okazos ankoraŭ seminarioj inter 01-03.12.2000. kaj inter 17-18.02.2001. Partoprenantoj de ĉi tiuj seminarioj povas havi internacian ekzamenon de IEI.

Pliaj informoj peteblas de: *Esperanto-Gesellschaft-Südharz, Grubenhagenstr. 8, DE-37412 Herzberg/Harz*

El Eventoj 194, retroŝta varianto

Hungario

Novaj E-kursoj en Debrecen

Mi raportas al vi pri la novaj E-kursoj gvidataj de mi mem en Debrecena Universitato. (Kiel vi scias eble, jarkomence unuiĝis tri universitatoj kaj kvin alternejoj – krom aliaj institutoj – en Debreceno.)

En TTK (Natursciencia Fakultato) ankaŭ ĉi-jare estis komencitaj la du kutimaj E-kursoj por trapasi t. n. studfinan ekzamenon (baznivelan). La du kursojn vizitadas 75 gestudentoj. La estro de BTK (Filologia Fakultato), kiu plurfoje antaŭe deklaris sian opinion ne tute favoran al Esperanto, invitis min gvidi tri E-kursojn por trapasi (supozeble nur la skriban) ŝtatekzamenon mezgradan. En la tri kursoj lernas entute 55 gestudentoj de socialaj fakoj. Kompreneble, BTK de DU akceptos la ŝtatekzamen-diplomon pri Esperanto.

Same tiun de tiuj 18 studentinoj de DOTE (Medicina Universitato - apartenanta al DU) en la urbo Nyíregyháza (njir'edjha'za), el kiuj kelkaj celas trapasi unu el la bazaj ŝtatekzamenoj parola kaj skriba. Aliaj studentinoj strebas trapasi sammaniere en la meza grado ŝtatekzamena, dum iuj devos prezenti atestilon pri ambaŭ ŝtatekzamenoj (parola kaj skriba) de meza grado. Konstateblas do, ke oni apenaŭ povas paroli pri egalaj postuloj prilingvaj en Debrecena Universitato.

Tamen, miaopinie, bela sukceso estas la nombro preskaŭ 150 de la novaj gekursanoj. La ŝtatekzameno okazos en marto 2001.

Tibor PAPP, db@satrax.hu

Kubo

Kompletigo de la Jarraporto '99 (en IPR 99/2-3)

La sekcio en Kubo laboras ene de KEA (Kuba Esperanto Asocio). El la 14 provincoj de Kubo en 7 okazis regulaj kursoj. Funkciis ankaŭ perkoresponda kurso, sed kun malmultaj kursanoj. En la ĉefurbo okazis seminarioj klerigaj kaj

porinstruistaj. Dum tiuj lastaj oni prezentis modellecionojn kaj pridiskutis la eblecojn plibonigi la lecionojn, uzi instruhelpilojn.


KEA kaj la ILEI-sekcio celas stimuli la E-instruadon laŭlonge de la insulo, sed ili laboras inter malbonaj kondiĉoj kaj ili ne havas sufiĉe da bonaj materialoj.

laŭ la raporto de Maritza Gutiérrez

Pollando

Esperanto por la angla

En la dua semajno de septembro 2000 en Bielsko-Biala 37 lernantoj (17-jaraj) de *Żeromski Liceo* ekis eksperimenton pri lingvo-orientiga instruado. Celo de la kurso estis pruvi, ke kono e Esperanto helpas en la lernado de fremdaj lingvoj. Antaŭ la kurso la liceaj instruistoj de la angla lingvo ekzamine mezuris la konon de la angla lingvo en du paralelaj klasoj, el kiuj unu tuj poste partoprenis tutsemajnan kurson de Esperanto. Simila studsemajno okazos januare. Fine de la lernojar, en junio okazos ekzameno, kiu kontrolos la progreson en la lernado de la angla lingvo en ambaŭ klasoj. Pluraj antaŭaj eksperimentoj faritaj en Germanio, Italio, Aŭstrio kaj Slovenio pruvis, ke la grupo kun kono de Esperanto pli rapide alproprigis fremdajn lingvojn. Ni esperas ricevi similan rezulton.



La eksperimento estis farata kun la permeso de oficialaj edukaj instancoj kaj ĝi estis kontrolata de la direkcio de la Liceo. La kurso okazis laŭ la Zagreba Metodo. Ĝi estis prov-instruado laŭ la materialoj kiujn oni planas eldoni Eldonejo KLEKS.

La kurson gvidis *Georgo Handzlik*, internacie konata E-instruisto kaj kantisto. La liceanoj partoprenis kvin lecionojn ĉiutage, sume 25 horojn. La instruado inkluzivis informojn ankaŭ pri la historio de Esperanto kaj pri la praktikaj eblecoj de la Internacia Lingvo. Jam en la dua tago la lernantoj legis kaj facile tradukis la unuajn ĉapitrojn el la romaneto „Gerda malaperis” de Claude Piron.

La kurso okazis ekster la Liceo, en la sidejo de Eldonejo KLEKS kaj Radio BIELSKO. La lernantoj dum la kurso vizitis ambaŭ entreprenojn, kiuj ĉiutage uzas Esperanton. Tio donis apartan valoron al la novaj adeptoj de nia lingvo.

La kvaran tagon post la fino de la kurso la lernejon vizitis la vicprezidanto de Sveda Esperanto Federacio, Bengt Nordlof, kiu dum unu horo prelegis Esperante pri Svedio. La lernantoj komprenis lin sen tradukisto, kio mirigis la aliajn lernantojn kaj la direktorinon de la Liceo. Nun la junuloj daŭrigos la lernadon en la licea klubo.

La kurso vekis ne-ordinaran intereson ĉe ĵurnalistoj. Aperis pluraj artikoloj pri la kurso kaj Esperanto en *Gazeta Wyborcza* – la plej granda taggazeto en Pollando – kaj tri aliaj gazetoj. La kursanoj estis intervjuataj de du lokaj radioj.

La lernantoj serĉas samaĝajn korespondamikojn: *Esperanto Klubo, Żeromski Liceo, PL-43-300 Bielsko-Biala, str. Bohaterów Warszawy 20, Pollando*

*Elżbieta Biskup,
Instruistino de la Liceo*

Raporto pri Interlingvistika sesio en Poznan

Inter la 25-29.09 okazis la sekva sesio de la Interlingvistikaj Studoj en la Adam Mickiewicz Universitato en Poznan (Pollando). Kvin novaj studemuloj (unu brito, unu belgo kaj 3 poloj) aliĝis al la grupo. Kursoj pri esperanta literaturo (Lidia Ligeza), pri Komunikado (d-ino Ilona Koutny), pri fonetiko (d-ino Ilona Koutny) kaj pri kulturo (d-ro Zbigniew Galor) konsistigis la programon. Zofia Banet-Fornalowa prezentis la e-an teatran arton kaj Judita Schiller la filmarton.

La sesion kompletigis la kultura programo de Arkones semajnfine: spektakloj de Jadwiga Gibczynska, Jerzy Fornal kaj de Studio "P". La partoprenantoj povis rigardi filmojn esperante parolantajn post la enkonduka prelego de J. Schiller, aŭskulti prelegon de Z. Fornalowa pri sia nova libro "Familio Zamenhof". Ne mankis muziko, kantado kaj diskutoj pri la rolo de esperanto. Dum la aranĝo la unuan fojon okazis ankaŭ du AIS-kursoj enkadre de la 18-a Pola Studsesio organizita fare de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (Bydgoszcz).

*D-rino Ilona Koutny, Adam Mickiewicz Universitato,
Miedzochodka 5, PL-60-371 Poznan, T/F (sekr.): +48-61-861-85-72*

Por via notlibro

Serĉata: Varba direktanto por "Juna amiko"

*Nia lernejana revuo bezonas pli da laborfortoj
por teni sian elstaran lokon en la movada gazetaro*

Kernaj taskoj

1. Ekkoni la gazeton kaj analizi ĝian legantaron nunan kaj potencialan.
2. Verki porokazajn varbilojn (kaj ekde sept. 2001 la ĉiujaran) kaj plani ilian distribuon.
3. Ekkoni la perantojn kaj iliajn bezonojn; liveri al ili varbilojn, konsilojn kaj apogon.
4. Elekti kelkajn landojn kie plej indos varbi kaj starigi tie kampanjojn.
5. Krei kaj distribui gazetarajn komunikaĵojn al paperaj kaj retaj gazetoj kaj radio-stacioj.

Pliaj dezirindaj taskoj:

6. Arigi taksojn, komentojn kaj dezirojn de legantoj kaj instruistoj por gvidi la redakcion.
7. Liveri proponojn evoluigi la hejmpaĝon de JA kaj uzi aliajn retajn eblecojn diskonigi la revuon.
8. Varbi kolektivajn mendojn, anoncojn aŭ aranĝojn, kunsendi informilojn de aliaj organizoj.

La nova oficanto ricevos: Adresaron de abonintoj 1996-2000, instruistoj, konataj esperantaj familioj kaj gazetoj. Adresaron de la perantoj (retaj kaj paperaj) en uzebla formo. Analizon de la laŭlandaj abonciferoj 1992-2000 kaj konsiloj pri varb-strategio. Specimenojn de la revuo kaj de varbiloj uzitaj tra la lastaj jaroj.

Kompenso por 2001 estos 0,10 EUR por ĉiu abonanto pli ol mil (la sumo por 2000.) Deĵoro okazu ekde antaŭhieraŭ (jam por varbojaro 2001). La varba direktanto ne devas situi proksime al la redaktejo, sed retkonekto estas tre dezirinda. Skribu al la redaktoro aŭ estarano pri eldonado por peti pliajn informojn aŭ proponi vin. Proponojn akompanu konciza priskribo de la situacio kaj kapabloj de la kandidato kaj alvenu ĝis la jarfino.

Ni serĉas ekde nun iun aŭ iujn preta(j) transpreni la administrajn kaj ekspedajn laborojn de la revuo, kiu(j) post enkonduko, transprenos la taskojn ekde 2002 (vidu IPR 00/2, p. 11). Ni detaligos tion venontnumere. La ekspedantoj devos troviĝi apud la presejo (nun Budapeŝto), la administranto ne nepre. La administranto povus esti samtempe la varba direktanto. Pri kompenso aŭ por aliaj informoj, turnu vin al la estarano pri eldonado, alivorte... Smg.

ILEI-bulteno: aperas 365-foje jare!

Jen reta informilo, kiu celas porti freŝajn informojn al membroj kaj interesatoj kaj krome servi kiel publika arĥivejo por niaj bazaj dokumentoj. Vizitu ĝin ajntage ĉe: <http://www.esperanto.nu/ileibulteno/index.html>

Enhavo je oktobro 2000:

- Eduka projekto "Interkulturo" (sinprezento)
- Kvazaŭa lernejo (laŭĉambra enhavlisto)
- Kvazaŭa lernejo (alfabeta indekso de enhavo)
- "Okulo" – ilustrita lernilo por etuloj (MacGill)
- "Instruado sen turmentado – la ĉefaj principoj de fremdlingvo-instruado", didaktika helpilo (Melnikov)
- Ekzameno pri instrukapablo (malneto de regularo)
- ILEI Fondajoj kaj kasoj
- 34a Infana Kongreseto en Zagrebo
- 33a Infana Kongreseto en Hadassim
- Statuto kaj regularo de ILEI
- Statuta indekso alfabeto
- Estraro de ILEI
- Kial ILEI-bulteno? (informas i.a. kiel kontribui erojn al la bulteno)

Prizorganto: smg

ILEI kontribuis ekzercojn al Pasporto

La usona asocio ELNA en oktobro distribuis al mendintoj la la trian aron da lecionoj de la vidbenda serio Pasporto al la Tuta Mondo. Tio enhavas la lecionojn 9 ĝis 12. Kun la bendo iros la ĵus finverkitaj suplementaj ekzercoj kontribuitaj de ILEI por la lecionoj 5-8 de la antaŭa bendo. En tiuj lecionoj, la intrigo kaj la gramatiko multe progresas. Leciono ses prezentas la modalajn verbojn (volas iri, devas preni ktp.), leciono ok la komparativon (pli, plej) ktp. Helena rapidas al la flughaveno por malhelpi, ke Ruselo forflugu hejmen, Flora estas juĝata en la kortumo, Georgo detruas la aŭton de la doktoro, al kiu, cetere, Karlo enamiĝas. Naskiĝas la ideo starigi Esperanto-kafejon, kiu fariĝas ĉestemo en la ĵus pretigitaj lecionoj.

La komisiito de ILEI pretigis meze 12 paĝojn da ekzercoj por ĉiu leciono, kiuj, kune kun la rakontaj kaj gramatikaj resumoj, la vortlistoj kaj respondoj ampleksas 73 grandformatajn paĝojn. Ilustraĵojn liveris Gejl Lucas. Tiuj, kiuj uzas NTSC formaton de video (plej parte la kontinento de Ameriko kaj multe da Azio), la ekzercojn kaj bendo-kompletojn (kun la ekzercoj kaj scenara teksto) mendu de ELNA (elna@esperantousa.org), eŭropanoj kaj aliaj, kiuj uzas PAL formaton, mendu de FEL (info@fel.esperanto.be).

(Daŭrigo de la rubriko sur la lasta paĝo!)

Aliĝilo por la 35-a ILEI-Konferenco

28.07 – 04.08.2000, Lovran, Kroatio

(Bonvolu skribi pres-stile. Valuto en EUR.)

Familia nomo _____

Persona nomo _____

Naskiĝdato: ____ / ____ / ____ (tago/monato/jaro) Sekso: viro/-ino

Profesio _____ Hobio _____

Adreso _____

Poŝtkodo _____ Urbo _____

Lando _____ Tel: _____

Fakso: _____ Retadreso: _____

Mi pagas konferenc-kotizon _____ EUR

Mi komprenas kaj akceptas la kondiĉojn presitajn en tiu ĉi aliĝilo.

Subskribo: _____

Dato: _____ (en la sama ordo kiel supre)

Aliĝkotizo _____ EUR

Donacoj al _____

ILEI _____ EUR

Infankongresa kaso _____ EUR

Eldona kaso _____ EUR

Dazzini kaso _____ EUR

Koleghelpa kaso _____ EUR

Interkulturo _____ EUR

Bankkostoj _____ EUR

Sume _____ EUR

* Pagmanieroj:

a) al ILEI-konto ilek-a ĉe UEA (bonvolu sendi al la Kasisto de ILEI la kopion de via pago)

b) al postĝirkonto 682117-7, ILEI c/o Boo Mee Kim-Lindblom, Kasisto, Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge, Svedio.

* Bonvolu aldoni 6 EUR por bankkostoj.

* Bonvolu nepre sendi la subskribitan aliĝilon kun pago al la Kasisto de ILEI.

Aliĝkotiĝoj por la 35-a ILEI-Konferenco en Lovran, Kroatio:

A- kaj B-landoj same kiel ĉe UEA. La prezoj estas indikitaj en EUR.

La kotiĝo ne inkluzivas loĝadon, manĝon kaj ekskurson.

	ĝis 01-01-31	ĝis 01-04-30	ekde 01-05-01
Kategorio	A / B	A / B	A / B
1. ILEI-ano	30 / 20	40 / 30	50 / 35
2. Ne ILEI-ano	40 / 25	50 / 35	55 / 40
3. Junulo, händikapulo	20 / 15	30 / 25	40 / 35

Loĝado, manĝado

Hotelĉambroj (po unu persono, unu nokto)

2-lita kun matenmanĝo _____ 30 EUR (a)

duonpensiono _____ 32 EUR (b)

plenpensiono _____ 38 EUR (c)

1-lita kun matenmanĝo _____ 42 EUR (ĉ)

duonpensiono _____ 45 EUR (d)

plenpensiono _____ 50 EUR (e)

Lerneja loĝejo

4-6-lita plenpensiono _____ 19 EUR (f)

Mi mendas loĝadon en kategorio..... ekde la..... de julio ĝis la..... de aŭgusto.

Mi deziras loĝi kun _____ (nomo kaj lando).

Mi estas vegetarano: jes (), ne ().

Tuttaga ekskurso kun lunĉo _____ 40 EUR (g)

Mi mendas tuttagan ekskurson: jes (), ne ().

Transporto de Zagrebo al Lovran _____ 20 EUR (ĝ)

Mi mendas la transporton: jes (), ne ().

Seminarioj

Mi aliĝas al la Cseh-seminario: jes (), ne ().

(Se AIS-prelego okazos, IPR 1/01 informos pri tio.)

Mi pagas al _____ en sumo _____ EUR.

Pri la 35a ILEI-konferenco en Lovran (Rijeka)

Urbeto Lovran

La 35a ILEI-konferenco okazos en malgranda urbeto Lovran en Kroatio. Lovran situas en haven-urbo, Rijeka regiono, kaj la urbeto estas iama imperiestra rezidejo. Fama turista loko same kiel Opatija, kien oni atingas de konferencetoj tra kelk-kilometra belega apudmara promenejo.

Konferenceto estas la loka lernejo, nur 5-minuta promeno de la hotelo.

Loĝejo

La hotelo havas tre bonajn prezojn, ĉar la prezo inkluzivas manĝojn: plena pensiono havas 3 manĝojn – matenmanĝon, lunĉon kaj vespermanĝon –, duonpensiono havas 2 manĝojn – matenmanĝon kaj lunĉon/ matenmanĝon kaj vespermanĝon –, kaj se oni volas havi luksajn lunĉon kaj vespermanĝon en la urbo Rijeka, oni povas preni nur matenmanĝon.

En ĉiuj ĉambroj troviĝas telefono, necesejo kaj banejo. Al la maro nur 5-minuta promeno, kaj ĉirkaŭaĵo estas tre kvietaj kaj arbaretaj. Oni povas labori aŭ kunsidi intense kaj ripozi trankvile.

Oni povas loĝi ankaŭ en malmultekosta studenta loĝejo en la lernejo apud la hotelo, kaj tie ni konferencos. La prezoj troviĝas en la aliĝilo.

Se oni volas loĝi kun iu amiko en la sama ĉambro, oni devas indiki tion en la aliĝilo.

Vegetaranoj ankaŭ devas anonci sin en la aliĝilo por faciligi la organizadon.

Tuttaga ekskurso

Oni nomas Istriion „Magia Tero”, kiu estas kroata duoninsulo apud Adria Maro. En Istrio oni produktas ĉefe vinon kaj oliv-oleon. Sed preskaŭ la tuta Istria marbordo allogas eksterlandajn turistojn, kio donas 90 % da enspezoj de Kroatio. La turistojn atendas multaj pitoreskaj urboj kaj belaj vilaĝoj.

Ni pasigos en tiu regiono 10 horojn, vizitante Opatija, Pula, Rovinj kaj Poreĉ. Lunĉon inkluzivas la prezo. Je la 8 matene la buso ekveturos kaj revenos iom post la sesa aŭ plej malfrue ĝis la oka vespere.

En Rijeka troviĝos multaj koncertejoj, ekspozicioj kaj muzeoj, kaj oni mem libere kaj ege malmultekoste povas ĝui la eventojn en tiu haven-urbo.

Transporto

Iom post la Fermo de UK en Zagrebo Konferenc-partoprenantoj kune veturos al Rijeka (Lovran). La veturado daŭros ĉirkaŭ 2 horojn. Eventuale, kaj se la tempo permesos, ni povos viziti iun vidindajn survoje.

Reveturi hejmen oni mem devas aranĝi. Al Zagrebo kaj Triesto oni povas veturi per buso aŭ trajno, kiuj havas malaltajn prezojn.

BM

Senpaga E-kurso por anglalingvanoj

Ĝi haveblas per la reto, aliĝu per la TTT-paĝo ĉe <http://www.iki.fi/pacujo/esperanto/course/> aŭ se vi ne havas aliron al TTT, retmesaĝu al la administranto Marko Rauhamaa ĉe marko.rauhamaa@iki.fi

La nombro de aliĝantoj nun atingis 300 monate, kaj ĉiam mankas instruistoj. Se vi sentas vin kapabla instrui, kontaktu s-ron Rauhamaa ĉe la menciita adreso. Tiu kurso ankaŭ haveblas en la reto en versioj i.a. hispana kaj ĉina. Se vi bezonas kontaktinformojn por tiuj versioj, bonvolu kontakti Don Harlow per retpoŝto: don@donh.vip.best.com

El la AAIE-Bulteno 144

Familiaĵoj

Nia redakcio ricevis (de Katarina Bodnárova) la 2-an ĉi-jaran numeron de Familia Esperanto, kiu estas la neregula cirkulaĵo de Rondo Familio de UEA. Gratulojn, kaj dankon!

Renkontiĝo de Esperantistaj Familiaĵoj (REF) havas novan TTT-paĝon: www.inet.hr/~ajagnjic. Bonvolu viziti ĝin!

Donacintoj por ILEI en 2000

Por Interkulturo

H. Kesäla, FI
Maŭro La Torre, IT
Jennifer Bishop, AU
Heinz Schindler, DE
Nederlanda ILEI-sekcio
Fonduso Saliko

Por aliaj kontoj de ILEI

Heinz Schindler, DE
Anna-Maria Lange, SE
Robert Moerbeek, NL
Nel Overwater, NL
Simon Smits, NL

Koregajn dankojn al ĉiuj! Ni bonvenigas korajn subtenojn de multaj e-istoj.

Boo Mee Kim-Lindbloom, Kasisto de ILEI

Postparole

Estis planite aperigi tekston de estrarano pri edukaj celoj kaj rimedoj, kiel daŭrigo de la debato kun UEA kadre de ĝia nova strategia plano. Tiu artikolo ne estis verkebla ĝis la limdato, ĝuste pro manko de tempo (alivorte, rimedoj). JN

REDAKTOREJO

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende. Presado: Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Tel: +32-3-234 34 00.

Redaktejo: NÉMETH József, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: nlalt@konyvtar.c3.hu, tel: +36-89/ 356-050. Laboreja fakso (ĝi funkcias nur en lernotagoj, antaŭtagmeze): +36-89/ 324-896). La nova retadreso de nia vicredaktoro: smidik@matavnet.hu. La nunan numeron ni sendis al la presejo la 13-an de novembro, redaktofino por la sekva numero: la 15-a de januaro 2001.

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: Duncan Charters (prezidanto), Bill Maxey (sekretario)

Elekta: Gwenda Sutton (kunvokanto), Maritza Gutierrez, Joseph Catil

Kontrolo: Bertil Andreasson, Lars Forsman, Bo Sandelin

Leoneja: Marija Belošević, Jennifer Bishop, Renato Corsetti, Stefan MacGill, Géza

Kurucz, Maŭro La Torre, Raita Pyhälä

Regulara: Rob Moerbeek, Hans ten Hagen

Terminara: Maŭro La Torre

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

UNESKO (en operaciaj rilatoj). Rerezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 42 quai de la Loire, FR-75019 Paris, Francio

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

ILEI estas jure registrita ĉe la komerca ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.

La membreco inkluzivas ricevon de 4 numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto.

Kasisto de ILEI: Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge; tel. (+46 8) 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>, postĝirkonto: 682117-7.

Membro-kotizoj: A-landoj (laŭ UEA-divido): 14 EUR, B-landoj: 8 EUR. Simpla abono sen membreco: 18 EUR.

Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉek plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA: UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago. Kontoj ĉe UEA: ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko) kaj pike-b (Projekto Interkulturo). Detala listigo de pagmanieroj al UEA aperas sur p. 37 de Jarlibro 1999. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago.

Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

Interreto

<http://lps.uniroma3.it/ilei> Bazaj informoj pri ILEI kun ligoj al aliaj paĝoj

<http://lps.uniroma3.it/eins> La diskutejo E-INS pri Esperanto-instruado

<http://lps.uniroma3.it/eler> Tabelo de Esperanto en lernejoj (E-LERnejoj)

<http://lps.uniroma3.it/kler> Kvazaŭlernejo "Tibor Sekelj" por la Projekto

Interkulturo.

<http://esperanto.nu/ileibulteno/index.html> ILEI-Bulteno

www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto Juna Amiko

www.hungary.net/esperanto/tend-tag.htm Tendaraĵoj (angla priskribo)

www.nl-papa.hu/ipr/ Internacia Pedagogia Revuo

SEKCIESTROJ de ILEI

Albanio: Bardhyl Selimi,
Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3,
AL-Tirana

Argentino: Teresita Alaniz,
El Ombú s/n, AR-5801 Alpa
Corral

Aŭstralio: Jennifer Bishop,
39 Hill Street, Hawthorn,
Victoria AU-3122

✉: esperanto@education.monash.edu.au

Belgio: Raymond Wylleman,
A. Vermeylenstr. 65, BE-8400
Oostende

Brazilo: Elvira Fontes, Rua
Machado de Assis 243, ap. 11,
BR-04106-010 Sao Paulo (SP)

Britio: Malcolm Jones,
1 Regent Avenue, Skipton, GB-
North Yorkshire BD23 1AZ

Ĉeĥio: Jana Melichárková,
CZ-696 02 Ratiškovice 938
✉: mmelicharek@iol.cz

Ĉinio: Zhang Danchen,
General Foreign Languages
Dept., 29-34 North Part,
Huazhong Normal University,
CN-430070 Wuhan

✉: zdchen@public.wh.hb.cn

Finnlando: Raita Pyhälä,
Jykyrintie 3,
FI-69440 Lestijärvi,

✉: raita.pyhala@lestijarvi.fi

Francio: Joseph Catil,
5, rue des Calabres,
FR-69330 Meyzieu,

✉: joseph.catil@wanadoo.fr

Germanio: Michael J.
Scherma, Von Thürheimstr. 47,
DE-89264 Weissenhorn

Hungario: József Németh,
Kilián ltp. 75/9, HU-8500 Pápa

✉: nlalt@konyvtar.c3.hu

Irano: Hamzeh Šafii, P.O.
kesto 17765-184, IR-Teheran

✉: ilei.ir@esperanto.org

Italio: Luigia Oberrauch
Madella, via Prampolini 8,
IT-43100 Parma

✉: vmadella@tin.it

Japanio: Masumi Suzuki,
Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi,
Tokio, JP-181-0001

Katalunio: Luz Vázquez,
Apartat 553, ES-43200 Reus

✉: ilei-cat@esperanto.nu

Kroatio: Ivan Bekavac-Basić,
Kušlanova 59,
HR-10000 Zagreb

Kubo: H. Jiminéz, Apartado
5120, CU-10500 Ciudad de la
Habana

✉: kubesp@ip.etcসা.com

Nederlando: Atilio Orellana
Rojas, Riouwstraat 172,
NL-2585 HW Den Haag,
✉: iei001@worldonline.nl

Norvegio: Björn Thuv,
I.F. Gjerdrums vei 33
NO-1396 Billingstad

✉: bjthuv@c2i.net

Pollando: Maria Majerczak,
ul. Armii Krajowej 7, m. 122,
PL-30 150 Krakow, ☎: (+48
12) 638 14 49

Rumanio: Prof. Popa Florica,
Str. Eroilor 29, ap. 7.
RO-1900 Timisoara

Rusio: Irina Gončarova,
Moloeznaja 38-10, Odincovo 2,
Mosk. obl. RU-143000

✉: ab2928@mastak.sitek.ru

Svedio: Bertil Andreasson,
Södra Rörum pl. 455, SE-24294
Hörby ✉: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com

Svislando: François Randin,
Str. Vallombreuse 14,
CH-1004 Lausanne

✉: ilei.ch@esperanto.nu

Togolando: Attiogbe-
Agbamadon B., Mensah, T. I. E.
To, B.P. 13169, Lome-TOGO,

✉: esp.togo@cafe.tg

Usono: Doroteo Holland,
5140 San Lorenzo Dr, Santa
Barbara, CA 93111-2521 (US)

✉: 72644.2450@compuserve.com

REPREZENTANTOJ de ILEI

Armenio: Lida Elbakjan,
Moldovakan 26/2, kv. 52,
AM-375062 Erevan

Bosnio kaj Hercegovino:
Nimeta Kulenovič, Branica
Sarajeva 15/V, BA-71000
Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez,
Casilla 231, Curicó, CL-Séptima
Región ✉: strigo@ctcreuma.cl

Danio: vakas
Estonio: Helgi Ilromova,
Pk. 94, EE-3053 Keila

Islando: Loftur Melberg,
Skolabraut 1,
IS-220 Hafnarfjörður

Israelo: Murjan Josef,
P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv

Jugoslavio: Radojica
Petrovič, Bul. Oslobođenja 36,
YU-32000 Čačak

✉: radp@emi.yu
Kongo: Ngangu Nduantoni-
Bakidila,

B.P. 13, CG-Lukala (Bas-Zaire)

Kostariko: Hugo Mora
Poltronieri, Apartado 4981,
CR-1000 San José

✉: miaumiau@pop.racsas.co.cr

Koreio: So Jin Su, Dept. de
Ekonomiko, Universitato Kang-
nam, Kugali Kihung-up, Yon-
gin-gun, Kyonggi-do KR-499-
900 ✉: so@kns.kangnam.ac.kr

Litovio: Algimantas
Piliponis, Karolinisiu 3-93,
LT-2044 Vilnius

Nov-Zelando: Gwenda Sut-
ton, 12C Herbert Gardens, 186
The Terrace, NZ-Wellington 1
✉: Sir_Lancelot@compuserve.com

Portugallio: João Jose Santos
Rua da Escola, lote 57 - r/c esq
Vale Grande, PT-1675 Pontinha

Slovenio: Marija Zlatnar-
Moe, Miličinskega 66, SI-1000
Ljubljana.

✉: Marija.Zlatnar@guest.arnes.si

Ukrainio: Svetlana Fedotova,
P.O. Kesto 88,
UA-253222 Kiev

Uzbekistano: Eugeno S.
Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-
700000 Taškent, CIS

✉: eugenyia@esper.gimli.com

Venezuelo: Prof. J.E.
Bachrich, Apartado VE-70782,
Caracas 1071 A

